L. N. TOLSTOJ

# KRISTANISMO KAJ PATRIOTISMO

TRADUKIS

I. MAĈERNIS


19 31

*SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA*

*ELDONA FAKO KOOPERATIVA / LEIPZIG*

*La franco-rusaj festoj, okazintaj en oktobro de pasinta jaro 1893 en Francio, elvokis en mi, verŝajne tiel same, kiel en multaj homoj, komence senton de komuneco, poste de malkompreno, poste de indigno, kiujn mi volis esprimi en mallonga ĵurnala artikolo; sed pripensante ĉiam pli kaj pli la ĉefajn kaŭzojn de tiu stranga fenomeno, mi venis al tiuj konkludoj, kiujn nun mi prezentas al la legantoj.*

*L. T.*



L. N. TOLSTOJ

# ANTAŬPAROLO DE L' ELDONANTOJ

---

Por pravigi la eldonon de tiu ĉi verko de L. Tolstoj en la kadro de la SAT-Biblioteko, sufiĉus jam plene la rekono pri ĝia alta literatura kvalito. Verkitaj kun arda pasio kaj superega arta talento, ĉiuj liaj libroj estas literaturaj perloj.

Sed ni ankaŭ ne devas forgesi la signifon, kiun Tolstoj havas sur la fono de sia epoko por tiu medio, en kiu li vivis, kiun li observadis kaj kun kiu li kunsentis. Tolstoj, profunda konanto de la rusa kamparana animo, batalanta en sia, ofte certe tre konfuza maniero, kontraŭ la jugo de l' carismo turmentanta kaj subpremanta, por la liberigo de l' homo-kamparano, estas antaŭulo kaj profeto de l' granda rusa Revolucio, kiun alia supera homo, homo kun politika klarvido kaj konscio pri agmaniero kaj metodoj necesaj por la liberigo de l' rusa proletaro, efektivigis — Lenin.

Certe, Tolstoj ne malligis la nodon, sed li antaŭsentis la alproksimiĝon de pli gravaj revoluciaj okazoj

ol tiuj de l'jaroj 1905-06 kaj verkis sub tiu impreso. Neniu alia ol Lenin mem juste taksis la signifon de Tolstoj, skribante : « Tolstoj estas granda, ĉar li sciis, kiel neniu antaŭ li, esprimi, reliefigi la ideojn k aspirojn, kiuj formiĝis ĉe milionoj da rusaj muĵikoj en la momento de l' eksplodo de la burĝa revolucio en Rusio ».

Kaj poste Lenin resumas sian opinion pri Tolstoj tiel : « Tolstoj lasis al ni genian kolekton da artaj dokumentoj akuzantaj kaj donantaj neeviteblajn batojn al la tuta nuntempa kapitalista sistemo ». Kaj li daŭrigas : « Cetere Tolstoj komprenis absolute nenion rilate al agmetodoj efikaj kaj necesaj por apliki en la batalo, diktita de la malpardonema logiko de l' historio... »

Se Lenin forĵetas kun malplaĉego la tolstojismon kiel politikan skolon, li volonte konsideras Tolstoj kiel samvojiranton kaj eĉ kiel kunliganon, koncerne la akran kritikon je ĉiuj negativaj flankoj de la burĝa vivo.

Konsiderante tiun rolon de Tolstoj en socipolitika rilato, la legantoj sekvos en la ĉi tie prezentita verketo kun ĝuo liajn arte tiel belformajn, laŭ pensado tiel profundajn kaj kun arda pasio verkitajn akuzojn kontraŭ la Patriotismo.

---

# KRISTANISMO KAJ PATRIOTISMO

---

## I

Rusoj kaj Francoj vivis multajn jarcentojn konante unu la alian, enirante iafoje amikajn, plejparte bedaŭrinde tre malamikajn, elvokatajn de iliaj registaroj rilatojn unu kun alia, kaj subite kaŭze de tio, ke antaŭ du jaroj la franca eskadro alvenis Kronŝtaton kaj la oficiroj de eskadro surbordiĝinte en diversaj lokoj multe manĝis kaj trinkis diversspecan vinon, ĉe tio aŭskultante kaj elparolante multajn mensogajn kaj malsaĝajn vortojn, kaj kaŭze de tio, ke en la jaro 1893 tia sama rusa eskadro alvenis Tulonon kaj la oficiroj de rusa eskadro en Parizo multe manĝis kaj trinkis, aŭskultante ĉe tio kaj elparolante ankoraŭ pli multe da mensogaj kaj malsaĝaj vortoj, fariĝis tiel, ke ne nur tiuj homoj, kiuj manĝis, trinkis kaj parolis, sed ankaŭ ĉiuj tiuj, kiuj alestis ĉe tio, kaj ĉiuj tiuj, kiuj ne alestis ĉe tio, sed nur aŭdis aŭ legis en gazetoj pri tio, ĉiuj tiuj

milionoj da Rusoj kaj Francoj subite imagis, ke ili iel aparte amas sin reciproke, tio estas ĉiuj Francoj ĉiujn Rusojn, kaj ĉiuj Rusoj ĉiujn Francojn.

En Francio tiuj sentoj dum pasinta oktobro elmontriĝis per plej stranga maniero.

Jen kiel estas priskribata la renkonto de rusaj maristoj en la *Kamparana Sendito*, gazeto, kiu kolektas siajn sciigojn el ĉiuj ceteraj.

« Ĉe la renkontiĝo de rusaj kaj francaj ŝipoj, tiuj kaj aliaj krom la pafilegpafado salutis sin reciproke per ardaj, entuziasmaj krioj : « Hura ! Vivu Rusio ! Vivu Francio ! »

Al tio aliĝis la muzikĥoroj (estintaj sur multaj privataj ŝipoj) ludintaj himnojn — rusan « Dio gardu caron » kaj francan « Marsejezon » ; la publiko sur privataj ŝipoj svingis ĉapelojn, flagojn, naztukojn kaj florbukedojn ; sur multaj ŝipetoj troviĝis nur vilaĝanoj kaj vilaĝaninoj kun siaj infanoj, kaj ĉiuj tenis en manoj florbukedojn, kaj eĉ la buboj, svingante bukedojn, el tuta povo kriegis : « Vivu Rusio ». Niaj maristoj, vidante tian popolan ĝojegon, ne povis reteni larmojn...

En la haveno ĉiuj francaj militŝipoj, estintaj en Tulono, estis ordigitaj en du liniojn, kaj nia eskadro preterpasadis inter ili : antaŭe



iris la admirala kirasŝipo, post ĝi la ceteraj. Venis eksterordinare solena minuto.

La rusa kirasŝipo donis dekkvin pafilegpafojn je la honoro de franca eskadro ; responde la franca kirasŝipo donis la duoblan nombron de pafoj — tridek. De francaj ŝipoj ektondris la sonoj de rusa himno. La francaj maristoj suprenrampas ŝnurŝtuparojn kaj mastojn ; laŭtaj salutaj krioj senhalte fluas de ambaŭ eskadroj kaj de privataj ŝipoj ; la ĉapoj de maristoj, ĉapeloj kaj naztukoj de publiko — ĉio tio entuziasme estas svingata je honoro de karaj gastoj. De ĉie de sur akvo kaj de bordo tondras unu komuna krio : « Vivu Rusio ! Vivu Francio ! »

Laŭ marista etiketo, admiralo Avelan kun oficiroj de sia stabo surbordiĝis por saluti la lokajn estrarojn. En la haveno la rusajn maristojn renkontis la ĉefa franca marista stabo kaj la altaj maristaj oficiroj de Tulono. Sekvis komunaj amikaj manpremoj, akompanataj per pafilegtondro kaj sonorilado. La ĥoro de marista muziko ludis himnon « Dio gardu caron », kiun sekvis tondraj kriegoj de publiko : « Vivu caro ! Vivu Rusio ! » Tiuj kriegoj kunfandiĝis en unu potencan bruon, superantan la muzikon kaj pafilegpafadon.

Kiuj vidis tion, tiuj rakontas, ke en tiu minuto la ravo de popolamasego atingis la plej

altan gradon, kaj estas neeble pervorte komuniki, kiaj sentoj plenigis la korojn de ĉiuj alestantoj. Admiralo Avelan kun malkovrita kapo kaj akompanata de rusaj kaj francaj oficiroj eniris la maristan estrejon, kie lin atendis franca marista ministro.

Akceptante admiralon, la ministro diris :

— Kronŝtat kaj Tulono estas du lokoj, kiuj atestas pri la kunsento inter rusa kaj franca popoloj ; vi estos ĉie renkontataj kiel koraj amikoj. Registaro kaj tuta Francio salutas vin kaj viajn kunvojaĝantojn je via alveno, reprezentantojn de « granda kaj nobla popolo ».

La admiralo respondis, ke li ne havas vortojn por esprimi la tutan sian dankemon : « La rusa eskadro kaj tuta Rusio », diris li, « estos dankaj por via akcepto ».

Post mallonga interparolo, adiaŭante de la ministro, la admiralo duan fojon dankis lin pro la akcepto kaj aldonis :

— Mi ne volas foriri de vi ne eldirinte tiujn vortojn, kiuj estas gravuritaj en la koroj de ĉiuj rusaj homoj : « Vivu Francio [1] ! »

Tia estis la renkonto en Tulono ; la renkonto kaj festoj en Parizo estis ankoraŭ pli mirindaj.

---

[1] *Kamparana Sendito*, jaro 1893, n-o 41.



Jen kiel oni priskribas en gazetoj la renkonton en Parizo.

« Ĉiuj rigardoj estas direktitaj al la bulvardo *des Italiens*, de kie devas aperi rusaj maristoj. De malproksime fine alflugas la bruo de tuta uragano el ekkrioj kaj aplaŭdoj. La bruego fariĝas pli forta kaj klara. La uragano videble alproksimiĝas. Sur la placo la moviĝo estas grandega. La policanoj alĵetiĝas por liberigi la vojon al *Cercle Militaire*, sed tio montriĝas nefacila afero. En la amaso fariĝis neimagebla interpuŝiĝo kaj interpremo. Fine sur la placo aperis la taĉmentestro. En tiu sama momento sur ĝi etendiĝas la surdiga kriego : « Vivu Rusio ! Vivu Rusoj ! » Ĉiuj malkovras la kapojn, la publiko plenpleniganta la fenestrojn, balkonojn, lokiĝinta eĉ sur tegmentoj, svingas la naztukojn, flagojn, ĉapelojn, furioze aplaŭdas, el la fenestroj de supraj etaĝoj ĵetas tutajn nubojn da diverskoloraj kokardoj. La tuta maro el naztukoj, ĉapeloj, flagoj ondiĝas sur la kapoj de popolamasego staranta sur la placo. « Vivu Rusio ! Vivu Rusoj ! » krias tiu centmila popolamasego, penante plej bone ĉirkaŭvidi la karajn gastojn, etendante al ili la manojn kaj ĉiel elmontrante sian simpation [1].

---

[1] *Nova Tempo*.

Alia korespondanto skribas, ke la ravo de la popolamaso ĝislimis frenezon. Unu rusa publicisto, estinta tiutempe en Parizo, jene priskribas tiun procesion el maristoj :

« Oni diras veron — la okazintaĵo estis historia, mirinda, kortuŝanta ĝis larmoj, altiganta animon, deviganta ĝin tremi per tiu amo, kiu vidas en homoj fratojn kaj kiu malamas sangon kaj perfortajn aliigojn, la deŝiron de infanoj de la amata patrino. Mi troviĝas en ia haladzo dum kelkaj horoj. Al mi estis strange, preskaŭ ne laŭ miaj fortoj stari sur stacio de Lyon'a fervojo meze de reprezentantoj de franca administracio en per oro kudritaj uniformoj, meze de urbestraro en frakoj, kaj aŭdi la kriojn : « Vivu Rusio! Vivu caro! » kaj nian nacian himnon, ludatan kelkfoje sinsekve. Kie mi troviĝas? Kio okazis? Kia sorĉo unuigis ĉion tion en unu senton, unu prudenton? Ĉu oni ne sentas tie ĉi aleston de Dio, de amo kaj frateco, la aleston de io alta, ideala, malsupreniranta sur la homojn nur en altaj minutoj? La koro estas tiel plena je io ĉarma, pura kaj alta, ke la plumo ne kapablas tion esprimi. La vortoj estas palaj kompare kun tio, kion mi vidis kaj sentis. Tio estas ne ĉarmo, — tiu vorto estas tro banala, — tio estas pli bela ol ĉarmo. Pli pentrinda, pli



profunda, pli ĝojiga, pli diversspeca. Estas neeble priskribi tion, kio okazis ĉe *Cercle Militaire,* kiam sur balkono de la dua etaĝo aperis admiralo Avelan. Tie ĉi la vortoj povas nenion esprimi. Dum la diservo, kiam la kantistoj en preĝejo kantis « Sinjoro, savu homojn viajn », en la malfermitan pordon flugadis la solenaj sonoj de « Marsejezo » de blovinstrumenta orkestro ludinta sur la strato. Estis ia mirinda impreso, nekomunikebla [1]. »

## II

Alveturinte Francion, rusaj maristoj dum du semajnoj transiradis de festo al festo, kaj meze aŭ fine de ĉiu festo manĝis, trinkis kaj parolis. Kaj la sciigoj pri tio, kie kaj kion ili manĝis merkredon, kie kaj kion vendredon, kaj kion ili ĉe tio parolis, telegrafe estis komunikataj al tuta Rusio. Tuj kiam iu el rusaj kapitanoj trinkis je la sano de Francio, tio tuj fariĝis konata al mondo, kaj ĵus kiam la rusa admiralo diris : « Mi trinkas pro la ĉarma Francio », tiuj vortoj tuj estis diskonigataj tra la tuta mondo. Sed tio estis ne sufiĉa : la zorgemo de gazetoj estis tiela, ke estis komunikataj ne nur tostoj, sed eĉ menuo de

---

(1) *Nova Tempo,* oktobro 1893.

tagmanĝoj kun kukoj kaj krommanĝetoj, kiuj estis uzataj dum tagmanĝoj.

Tiel en unu numero de gazeto estis dirite, ke la tagmanĝo prezentis el si belan artverkon :

*Consommé de volailles, petits pâtés*
*Mousse de homard parisienne*
*Noisette de bœuf à la béarnaise*
*Faisans à la Périgord*
*Casseroles de truffes au Champagne*
*Chaud-froid de volailles à la Toulouse*
*Salade russe*
*Croûte de fruits toulonnaise*
*Parfaits à l'ananas*
*Desserts*

En la proksima numero estis dirite :

« Ankaŭ laŭ la kuirarta rilato la tagmanĝo lasis deziri nenion pli bonan ; menuo estis jena :

*Potage livonien et Saint-Germain*
*Zéphyrs Nantua*
*Esturgeon braisé moldave*
*Selle de daquet grand veneur*
ktp. »

En la sekvanta gazeto estas denove priskribata nova menuo. Ĉe ĉiu menuo estis detale priskribataj tiuj trinkaĵoj, kiuj estis englutataj de ĉiuj festenantoj : tia *vudka* (brando), tia *Bourgogne vieux, Grand Moët*



k. s. En angla gazeto aperis la listo de ĉiuj ebriigaj trinkaĵoj, kiuj estis englutitaj dum tiuj festenoj. Tiu kvanto estis tiel kolosa, ke apenaŭ ĉiuj drinkuloj de Rusio kaj Francio povus eltrinki tiom en tiel mallonga tempo.

Estis komunikataj ankaŭ la paroladoj de festantoj, sed la menuoj estis pli diversspecaj ol paroladoj. La paroladoj konsistis senŝanĝe el tiuj samaj vortoj, nur en diversa ĉeniĝo kaj translokiĝo. La senco de tiuj vortoj ĉiam estis unu tiu sama : Ni karese amas nin reciproke, ni ĝojegas, ke ni tiel karese ekamis unu la alian. Nia celo estas ne milito, kaj ne *revanche* (revenĝo), kaj ne repreno de forprenitaj provincoj, sed nia celo estas nur paco, la bonfaro de paco, la sekurigo de paco, la trankvilo kaj paco de Eŭropo. Vivu rusa Imperiestro kaj Imperiestredzino, ni amas ilin kaj ni amas pacon ! Vivu la Prezidanto de la Respubliko kaj lia edzino, ni ankaŭ amas ilin kaj ni amas pacon ! Vivu Francio, Rusio, ilia ŝiparo kaj armeo ! Ni amas armeon kaj pacon, kaj la estron de eskadro. La paroladoj plejparte finiĝis kiel en spritkantetoj per vortoj : Tulono, Kronŝtat, aŭ : Kronŝtat, Tulono. Kaj la nomoj de tiuj lokoj, kie estis tiel multo formanĝita da diversaj manĝaĵoj kaj eltrinkita da diversspeca vino, estis elparolataj kiel vortoj, me-

morigantaj la plej heroajn agojn de ambaŭpopolaj reprezentantoj, tiaj vortoj, post kies elparoliĝo restas nenio por diri, ĉar ĉio jam estas komprenita. Ni amas unu la alian kaj amas pacon, Kronŝtat'on, Tulonon! Kion oni povas aldoni al tio?... precipe ĉe la sonoj de solena muziko, ludanta samtempe du himnojn: unu, kiu laŭdas caron kaj petas de Dio por li ĉiujn bonojn, la alian, kiu malbenas ĉiujn carojn kaj al ili ĉiuj promesas la pereon.

Al homoj, kiuj precipe bone esprimis siajn amsentojn, estis donataj ordenoj kaj rekompencoj, kaj al kelkaj homoj por tiuj samaj meritoj aŭ simple pro troesto de sentoj oni prezentis donacojn plej strangajn kaj neatenditajn; tiel al rusa caro la franca eskadro kiel donacon alportis iun oran libron, en kiu ŝajnas esti skribita nenio kaj se eĉ estas io skribita, jen io, kion bezonas scii neniu; kaj al la estro de rusa eskadro inter aliaj donacoj oni prezentis ankoraŭ pli mirindan aĵon — rusan plugilon el aluminio, kovritan per floroj, kaj multe da aliaj tiel same neatenditaj donacoj.

Krom tio ĉiuj tiuj strangaj kondutoj estis akompanataj per ankoraŭ pli strangaj religiaj ceremonioj kaj komunaj diservoj, de kiuj, ŝajnus, la Francoj estas jam longe dekutimiĝintaj. Apenaŭ de Kronŝtata tempo estis



faritaj tiom da komunaj preĝoj, kiom en tiu mallonga tempo. Ĉiuj Francoj subite fariĝis neordinare piaj kaj zorgeme pendigadis en la ĉambroj de rusaj maristoj tiujn samajn bildojn, kiujn ili ankaŭ zorgeme, kiel malutilan ilon de superstiĉo, forportadis el siaj lernejoj, kaj seninterrompe preĝis. La kardinaloj kaj episkopoj ĉie ordonis la preĝadon kaj mem preĝis plej strangajn preĝojn. Ekzemple, episkopo en Tulono, ĉe la surakvigo de kirasa ŝipo « Ĵoregiberi », preĝis al Dio de paco, tamen ĉe tio aludante, ke se estos oportune, li povos sin turni ankaŭ al Dio de milito.

« Kia estos ĝia sorto », diris la episkopo, parolante pri la surakvigata kirasŝipo, « la sola Dio scias, ĉu ĝi elvomos morton el siaj teruraj internaĵoj — estas nekonate. Sed se, alvokinte nun Dion de paco, ni estus devigataj poste alvoki Dion de bataloj, ni forte esperas, ke « Ĵoregiberi » ekatakos la malamikon mano ĉe mano kun la potencaj ŝipoj, kies maristaro faris nun tiel fratan unuiĝon kun la niaj. Sed preteriru nin tiu perspektivo, kaj nuna festo lasu nur la pacajn rememorojn, kiel la rememoro pri grandduko Konstantino (Konstantino Nikolajeviĉ estis en Tulono en la jaro 1857), kiu ankaŭ tie ĉi ĉeestis la surakvigon de ŝipo « Kvirinal », kaj la amikeco inter Francio kaj

Rusio faru el tiuj du nacioj la gardantojn de l' paco... »

Dume dekmiloj da telegramoj transflugadis el Rusio Francion, kaj el Francio Rusion. Francaj virinoj salutis rusajn virinojn. Rusinoj dankis Francinojn. Trupo da rusaj aktoroj salutis francajn aktorojn; francaj aktoroj komunikis, ke ili lokas profunde en la koron la saluton de rusa aktora trupo. Rusaj kandidatoj por juĝejaj oficoj, estantaj ĉe regiona juĝejo de iu urbo, komunikis sian ĝojon al franca nacio. Iu generalo dankis iun sinjorinon; iu sinjorino asertis pri sia konsento kun rusa nacio iun generalon; rusaj infanoj skribis salutajn versojn al francaj infanoj; francaj infanoj respondis per versoj kaj prozo; rusa kultministro atestis al franca kultministro pri la subitaj amsentoj al Francoj de ĉiuj de li regataj infanoj, scienculoj kaj verkistoj; membroj de bestprotekta asocio asertis sian flaman sindonemon al Francoj; tion saman anoncis urbkonsilantaro de Kazan.

Kanoniko de Arras'a episkopejo anoncis al lia moŝto supera presbitero de rusa kortega pastraro, ke li povas certigi, ke en koroj de ĉiuj francaj kardinaloj kaj ĉefepiskopoj estas profunde ensigelita la amo al Rusio kaj al lia moŝto Aleksandro III kaj al lia eminenta



familio, kaj ke la francaj kaj rusaj pastroj konfesas preskaŭ tiun saman kredon kaj egale honoras Plejsanktan Virgulinon, al kio lia moŝto supera presbitero respondis, ke la preĝoj de franca pastraro por la moŝta familio ĝoje resonis en la koroj de tuta rusa caramanta popolo, kaj ĉar la rusa popolo egale honoras la Plejsanktan Virgulinon, ĝi povas konfidi al Francio je vivo kaj morto. Preskaŭ pri tio sama anoncis diversaj generaloj, telegrafistoj kaj marĉandistoj je koloniaj produktoj. Ĉiuj iun salutis, iun pro io dankis.

La ekscitiĝo estis tiom granda, ke oni faris plej eksterordinarajn farojn, sed neniu rimarkis ilian eksterordinaron; kontraŭe, ĉiuj laŭdis ilin, estis ravitaj de ili, kaj kvazaŭ timante malfruiĝi, ĉiu rapidis fari similan faron por ne malantaŭresti post aliaj. Se aŭdiĝis elparolataj aŭ eĉ skribitaj aŭ presitaj protestoj kontraŭ tiu furiozado, elmontrantaj ĝian malprudenton, oni kaŝis aŭ surdigis ilin (1).

---

(1) Al mi estas konata jena studenta protesto, sendita Parizon, sed ne akceptita de iu gazeto:

*Malfermita Letero al Francaj Studentoj*

« Antaŭ nelonge grupeto de moskvaj studentoj-juristoj kun la supera estraro ekkuraĝis paroli en nomo de tuta moskva studentaro kaŭze de Tulonaj festoj.

« Ni, reprezentantoj de studentarunuiĝoj, en plej

Ne parolante jam pri ĉiuj milionoj da perditaj labortagoj, uzitaj por tiuj festenoj, por epidemia drinkado de ĉiuj partoprenantoj, helpata de ĉiuj registaroj, ne parolante pri la sensenceco de prononcataj paroladoj, estis farataj plej frenezaj kaj kruelaj agoj, kaj neniu turnis sur ilin atenton.

Ekzemple estis ĝis morto premitaj kelkaj dekoj da homoj, kaj neniu trovis necesa eĉ mencii ilin. Unu korespondanto skribis, ke dum balo iu Franco diris al li, ke nun apenaŭ estas en Parizo ia virino, kiu ne perfidis siajn devojn por kontentigi la dezirojn de iu rusa maristo; kaj ĉio tio pasis eĉ ne rimarkite, kvazaŭ io, kio devas esti tiel. Montriĝis ankaŭ okazoj de malkaŝa freneziĝo. Ekzemple unu virino, surmetinte veston el francaj kaj rusaj flagoj, ĝisatendis la maristojn, ekkriis « Vivu

---

decida maniero protestas kiel kontraŭ uzurpado de tiu grupeto, tiel ankaŭ esence kontraŭ la interŝanĝo de salutoj okazinta inter ĝi kaj la francaj studentoj. Ni ankaŭ rigardas Francion kun arda amo kaj profunda respekto, sed tiel ni rigardas Francion tial, ke ni vidas en ĝi grandan nacion, kiu antaŭe konstante elmontris sin kiel proklamanto kaj portanto de grandaj idealoj de libero, egalo kaj frateco, kiu estis la unua en la vico de kuraĝaj provoj, enkorpigi en la vivo tiujn grandajn idealojn, kaj la pli bona parto de rusa junularo ĉiam estis preta saluti Francion, kiel antaŭbatalanton por la pli bona homara estonto. Sed ni ne povas konsideri tiajn festojn, kiel Kronŝtataj kaj Tulonaj, kiel konvenan motivon por similaj salutoj.

« Kontraŭe, tiuj festoj signifas malĝojigan, sed, ni esperas, nur tempan fenomenon — la perfidon de Francio al ĝia antaŭa granda historia rolo : la lando, kiu antaŭe alvokadis la tutan mondon disrompi la katenojn de despotismo kaj kiu proponis sian fratan helpon al ĉiu popolo, leviĝinta por sin liberigi, nun ekflamigas simiamon antaŭ rusa registaro, kiu sisteme malhelpas la normalan organisman kaj vivan kreskon de popola vivo, kaj senindulge subpremas, haltante antaŭ nenio, ĉiujn celadojn de rusa socio al lumo, libero kaj memstaro. La Tulonaj manifestacioj estas unu el aktoj de tiu dramo, kiu prezentas el si la de Napoleono III kaj Bismark kreita antagonismo inter du grandaj nacioj — Francio kaj Germanio. Tiu antagonismo tenas tutan Eŭropon armita kaj faras la rusan absolutismon la direktanto de politika sorto de l' mondo, tiun rusan absolutismon, kiu ĉiam estis la subteno de arbitro kaj despotismo kontraŭ libero, de ekspluatistoj kontraŭ ekspluatatoj. La senton de doloro pro sia lando, kompaton pro la blindiĝo de granda parto de franca socio — jen kiajn sentojn elvokas en ni tiuj festenoj.

« Ni estas tute konvinkitaj, ke la juna generacio de Francio ne lasos sin forlogi per ŝovinismo, kaj preta labori por tiu pli bona socia ordo, al kiu iras la homaro, scios al si komprenigi la nunajn okazaĵojn kaj teni sin rilate ilin en deca maniero ; ni esperas, ke nia arda protesto trovos kunsentan eĥon en koroj de la franca junularo.

« Konsilantaro de dudek kvar unuiĝintaj moskvaj studentaj rondoj. »

Rusio! », saltis de sur ponto en riveron kaj dronis.

Ĝenerale dum ĉiuj tiuj festenoj la virinoj ludis gravan rolon kaj eĉ gvidis la virojn. Krom la ĵetado de floroj kaj prezentado de donacoj kaj salutoj, la Francinoj sur la stratoj ĉirkaŭpremadis kaj kisadis rusajn maristojn, kelkaj ial alportadis al ili infanojn, proponis kisi ilin, kaj kiam la rusaj maristoj plenumadis tiun deziron, ĉiuj ĉeestantoj raviĝis kaj ploris.

Tiu stranga ekscitiĝo estis tiel epidemia, ke, kiel rakontas unu korespondanto, ŝajninta tute sana rusa maristo, post dusemajna rigardado al ĉiuj okazintaĵoj ĉirkaŭ li, meze de tago saltis de ŝipo maron kaj eknaĝis kriante : Vivu Francio! Kiam oni lin eltiris kaj demandis, kial li faris tion, li respondis, ke li donis solenan promeson je la honoro de Francio ĉirkaŭnaĝi la ŝipon.

Tiel per nenio malhelpata ekscitiĝo kreskis kaj kreskis, kiel bulo de ruliĝanta malseka neĝo, kaj kreskis fine ĝis tio, ke ne nur la ĉeestantoj, ne nur la disponitaj, malfortnervaj, sed ankaŭ fortaj normalaj homoj konformiĝis kun ĝenerala sentostato kaj falis en nenormalan staton.

Mi memoras, ke mi, distrite legante unu



el tiaj priskriboj de festenoj, subite neatendite eksentis la komunikiĝintan al mi senton, similan al kortuŝo, eĉ la preton al larmoj, tiel ke mi devis fari memperforton por venki tiun senton.

## III

Antaŭ nelonge profesoro de psikiatrio Sikorskij en Kievaj universitataj sciigoj priskribis la de li esploritan, kiel li nomas, psikopatian epidemion *malevanŝĉina,* aperintan en kelkaj vilaĝoj de Vasilkova regiono, gubernio Kievo. La esenco de tiu epidemio konsistis, laŭ vortoj de s-ro Sikorskij, en tio, ke kelkaj homoj el tiuj vilaĝoj influataj de sia gvidanto, nomata Malevanij, imagis al si, ke baldaŭ devas veni la mondfino, kaj pro tio ili, ŝanĝinte la tutan ordon de sia vivo, komencis disdonadi sian havajon, ornami sin, dolĉe manĝi kaj trinki, kaj ĉesis labori. La profesoro trovis ilian staton nenormala. Li diras : « Neordinara ilia bonanimeco ofte transiras en ekzalton, ĝojan staton, havanta neniajn eksterajn motivojn. Ili estis en sentimentala animstato : ĝentilaj ekscese, babilemaj, moviĝemaj kun rapide venantaj kaj tiel same facile kaj sen postsignoj malaperantaj ĝojlarmoj. Ili vendadis la necesaĵon por aĉeti ombrelojn, silkajn tukojn kaj similajn aĵojn,

ĉe tio la tukoj servis al ili nur kiel tualeta ornamo. Ili manĝis multe da dolĉaĵoj. Ilia humoro estis ĉiam vivĝoja, ili vivis senlabore: vizitadis unu la alian, promenadis kune... Kiam oni montradis al ili la evidente sensencan kaŭzon por ilia rifuzo de laboro, oni ricevadis responde stereotipan frazon: Se mi ekvolos — mi laboros, se ne ekvolos — kial mi devigus min?!»

La klera profesoro konsideras la staton de tiuj homoj kiel kazon de evidenta psikopata epidemio kaj konsilante al registaro uzi kelkajn kontraŭrimedojn kontraŭ ĝia disvastiĝo, finas sian komunikon per jenaj vortoj: «*Malevanŝĉina* estas ĝemkrio de loĝantaro kaj peto pri liberigo de vino kaj pri plibonigo de instruado kaj de sanitaraj kondiĉoj.»

Sed se *malevanŝĉina* estas ĝemkrio de malsaniĝinta loĝantaro kaj peto pri liberigo de vino kaj de malutilaj sociaj vivkondiĉoj, kia terura ĝemkrio de malsaniĝinta loĝantaro kaj kia peto pri ĝia savo de vino kaj de malveraj sociaj vivkondiĉoj estas tiu nova malsano, kiu aperis en Parizo kaj kun terura rapido ĉirkaŭprenis la pliparton de l' urba loĝantaro de Francio kaj preskaŭ tutan regantan kaj estrantan kulturan Rusion?

Kaj se oni devas konsenti, ke la psikopatia sufero de *malevanŝĉina* estas danĝera kaj ke



registaro faris bone sekvinte la konsilon de l' profesoro kaj foriginte la gvidantojn de *malevanŝĉina* per enfermo de kelkaj el ili en domoj por frenezuloj kaj monaĥejoj, per forsendo de aliaj en malproksimajn lokojn, — kiel pli danĝeran devas ni konsideri tiun nove aperintan en Tulono kaj Parizo, kaj de tie disvastiĝintan en tuta Francio kaj Rusio epidemion, kaj kiom pli necesa estas, se ne al registaro, tial al la socio preni plej decidajn kontraŭrimedojn kontraŭ la disvastiĝo de tiaj epidemioj.

La similo inter tiu kaj alia malsano estas kompleta. Tiu sama eksterordinara bonanimeco, transiranta en senkaŭzan ĝojan ekzalton, tiu sama sentimentalo, troa ĝentilo, babilemo, tiuj samaj seninterrompaj larmoj de kortuŝo, alvenantaj kaj forirantaj senkaŭze, tiu sama festa humoro, tiu sama promenado kaj vizitado unu la alian, tiu sama vestiĝo en plej belajn vestojn, tiu sama pasio por dolĉa manĝaĵo, tiuj samaj sensencaj paroladoj, sama mallaborado, sama muziko kaj kantado, sama gvidado de virinoj kaj tiu sama por multaj klaŭna sintenado *attitudes passionnelles*, kiun s-ro Sikorskij rimarkis ĉe malevanŝĉanoj, t. e. kiel mi komprenas tiun vorton, tiuj diversaj nenaturaj sintenoj, kiujn alprenas la homoj dum solenaj renkontoj, akceptoj kaj paroladoj dum tagmanĝoj.

La similo estas kompleta. La diferenco konsistas nur en tio, kaj tiu diferenco estas grandega por tiu socio, en kiu okazas tiuj fenomenoj, — ke tie, freneziĝas nur kelkaj dekoj da pacaj malriĉaj kamparanoj, vivantaj de siaj malgrandaj havaĵoj kaj tial ne povantaj perforti siajn najbarojn, kaj infektantaj aliajn nur per persona kaj buŝa transdono de sia animstato, tie ĉi kontraŭe estas freneziĝo de milionoj da homoj, havantaj grandegajn monsumojn kaj rimedojn devigi aliajn homojn : pafilojn, bajonetojn, fortikaĵojn, kirasŝipojn, melinitojn, dinamitojn, kaj krom tio havantaj en sia potenco la rimedojn por disvastigi sian freneziĝon : poŝton, telegrafon, grandegan nombron da gazetoj kaj diversspecajn eldonaĵojn, vete presataj kaj disportantaj ilian infekton en ĉiujn angulojn de l' mondo. La diferenco konsistas ankaŭ en tio, ke la unuaj ne nur ne drinkas ĝis ebrio, sed uzas tute neniajn ebriigajn trinkaĵojn ; la duaj troviĝas konstante en duonebria stato, kiun ili seninterrompe subtenas. Tial por la socio, en kiu okazas tiaj fenomenoj, inter Kieva epidemio, dum kiu laŭ sciigoj de s-ro Sikorskij, ne estas vidataj iaj perfortoj, mortigoj, kaj tiu, kiu aperis en Parizo, kie dum unu procesio estis mortpremitaj dudek virinoj, la diferenco estas tia, kia estus



inter tio, ke el forno elsaltas karbero kaj bruletas sur la planko, kiu videble ne ekbrulos de ĝi, kaj flamo, kiu ekkaptis jam pordon kaj murojn de domo. En plej malbona kazo la konsekvencoj de Kieva epidemio estos, ke la miliona parto de Rusio elspezos tion, kion ĝi gajnis per sia laboro, kaj ne estos plu kapabla pagi la ŝtatajn impostojn. La konsekvencoj de epidemio Tulono-Pariza, ekkaptinta la homojn, posedantaj teruran potencon : grandegajn monsumojn, ilojn por fari devigon kaj por disvastigi sian freneziĝon — povas kaj devas esti teruraj.

## IV

Oni povas kompate aŭskultadi tiun sensencaĵon, kiun babilas malforta, maljuna, nearmita frenezulo en sia ĉapelaĉo kaj mantelaĉo, eĉ ne kontraŭdiri al li kaj eĉ ŝerce konsenti kun li ; sed kiam tio estas tuta amaso el impertinentaj frenezuloj, elŝirintaj sin el sia enfermejo, kaj se tiu amaso de kapo ĝis piedoj estas armita per akraj ponardoj, sabroj kaj ŝargitaj revolveroj kaj en hazardo svingas tiujn mortigajn armilojn, — oni ne povas ne nur ŝerce konsenti kun ili, sed eĉ ne unu minuton esti trankvila. Tiel same la ekscitiĝstato prezentas

sin, kiun elvokis la francaj festoj, en kiu troviĝas nun la franca kaj rusa registaroj. Ĉar la homoj, infektiĝintaj nun de epidemio, posedas plej terurajn ilojn de mortigo kaj ruinigo.

Vere, en ĉiuj paroladoj, en ĉiuj tostoj, elditaj dum tiuj festenoj, en ĉiuj artikoloj pri tiuj festenoj senflankiĝe estis parolate, ke la signifo de ĉio okazanta konsistas en la certigo de paco. Eĉ la anoj de milito parolis ne pri malamo kontraŭ deŝirantoj de provincoj, sed pri ia amo, kiu iel malamas.

Sed estas ja konata la ruzo de ĉiuj animmalsanuloj, kaj rekte tiu persista ripetado, ke ni ne volas militon, sed volas pacon, kaj la silentado pri tio, pri kio ĉiuj pensas, faras plej minacantan fenomenon.

En sia responda tosto dum la tagmanĝo en la palaco de la Elizeoj, la rusa ambasadoro diris : « Antaŭ ol eldiri toston, sur kiu resonos el profundego de koroj ne nur ĉiuj troviĝantaj inter tiuj ĉi muroj, sed tiel same kaj kun sama forto ankaŭ ĉiuj tiuj, kies koroj malproksime kaj proksime sur ĉiuj punktoj de belega Francio, egale kiel ankaŭ de tuta Rusio, batas en nuna minuto unisone kun nia, — permesu al mi esprimi al vi nian profundan dankon por la salutaj vortoj, kiujn vi turnis al admiralo, kiun la caro komisiis redoni la Kronŝtatan



viziton. Ĉe via alta influo, kiun vi ĝuas, viaj vortoj karakterizas la veran signifon de belegaj *pacaj* solenoj, festataj kun tia mirinda unuanimeco, lojalo kaj purkoreco. »

Tiel same per nenio pravigata aludo je paco troviĝas en la parolado de l' franca Prezidanto. « La amkatenoj, kunligantaj Rusion kaj Francion », li diris, « kaj antaŭ du jaroj firmigitaj per kortuŝantaj manifestacioj, kies objekto estis nia ŝiparo en Kronŝtato, kun ĉiu tago fariĝas pli intima, kaj la *honesta* interŝanĝo de niaj amikaj sentoj devas entuziasmigi ĉiujn tiujn, por kiuj estas kara la bonfaro de paco, konfido kaj sendanĝereco », ktp.

En unu kaj en alia parolado tute neatendite kaj sen ia motivo oni parolas pri bonfaroj de paco kaj pri pacaj solenaĵoj.

Tio sama troviĝas ankaŭ en la telegramoj, kiujn interŝanĝis rusa Imperiestro kaj franca Prezidanto. Rusa Imperiestro telegrafas :

« En momento, kiam la rusa eskadro forlasas Francion, mia koro devigas min esprimi al vi, kiel mi estas kortuŝita kaj danka por la varma kaj belega akcepto, kiun mia ŝiparo trovis ĉie sur franca tero. La atestoj de viva simpatio, kiuj manifestiĝis ankoraŭ unufoje kun tia elokvento, aldonos novan ĉenon al tiuj, kiuj unuigas la du landojn, kaj kunhelpos, mi es-

peras, al fortikigo de ĝenerala paco, objekto de viaj penadoj kaj de viaj konstantaj deziroj », ktp.

La franca Prezidanto en sia responda telegramo diras :

« La depeŝon, por kiu mi dankas vian moŝton, mi ricevis, kiam mi forlasis Tulonon por reveni Parizon. La bela eskadro, sur kiu mi havis la kontenton saluti la rusan flagon en franca akvaro, la kora akcepto, kiun viaj bravaj maristoj renkontis ĉie en Francio, unu plian fojon atestas pri sincera simpatio, kiu unuigas niajn du landojn. Samtempe ili atestas pri profunda konfido je bonfara influo, kiun povas efiki kune du grandaj nacioj sindonaj al pacafero. »

Denove en ambaŭ telegramoj tute nekonvene estas aludita paco, havanta nenion komunan kun la festoj de maristoj.

Estas neniu parolado, neniu artikolo, en kiu oni ne parolus, ke la celo de tiuj ĉiuj orgioj estas paco de Eŭropo. Dum tagmanĝo, kiun donas la reprezentantoj de rusa gazetaro, ĉiuj parolas pri paco. S-ro Zola, kiu antaŭ nelonge skribis, ke la milito estas necesa kaj eĉ utila, kaj s-ro Voque, kiu ne unufoje gazete eldiradis tion saman, ne parolas eĉ vorton pri milito, sed parolas nur pri paco. La kunsidoj de parlamentoj komenciĝas per paroladoj pri



pasintaj festoj ; la oratoroj certigas, ke tiuj festoj estas proklamo de paco al Eŭropo.

Simile, kiel homo, veninta en pacan societon kaj fervore ĉe ĉiu okazo penanta kredigi la ĉeestantojn, ke li tute ne havas intencon elbati la dentojn al iu ajn, subbatadi la okulojn kaj rompadi la manojn, sed intencas nur pace pasigi vesperon. « Neniu ja pridubas tion », oni volas diri al li. « Se vi tamen havas tiajn abomenajn intencojn, almenaŭ ne ekkuraĝu paroli pri ili. »

En multaj artikoloj skribitaj pri festoj eĉ klare kaj naive estis elparolata la kontento, ke dum la festoj neniu eldiris tion, kion *tacitu consensu* estis decidite kaŝi de ĉiuj, kaj ke nur unu ne singarda homo, tuj forigita de polico, ekkriis tion, kion ĉiuj pensis, nome : *à bas l'Allemagne !*

Tiel la infanoj iafoje estas tiel ĝojaj, ke ili kaŝis sian petolon, sed la ĝojo perfidas ilin.

Kaj kial tiel ĝoji, ke neniu diris pri milito, se ni vere ne pensas pri ĝi ?

## V

Neniu pensas pri milito, sed nur miliardoj estas elspezataj por militaj preparoj kaj milionoj da homoj staras ĉe pafilo en Rusio kaj Francio.

« Sed tio estas farata por garantii pacon. *Si vis pacem para bellum.* (Se vi volas pacon, preparu militon) (¹). *L'empire c'est la paix, la république c'est la paix.* (La imperio estas paco, la respubliko estas paco.)

Sed se estas tiel, kial do ĉe ni en Rusio ne nur en ĉiuj ĵurnaloj kaj gazetoj, eldonataj por tiel nomataj kleraj homoj, estas elmontrataj la strategiaj profitoj de nia alianco kun Francio por la militkazo kontraŭ Germanio, sed eĉ en *Kamparana Sendito*, gazeto eldonata de rusa registaro por popolo, estas inspirata al tiu malfeliĉa, de registaro trompita popolo, ke « amiki kun Francio ankaŭ por Rusio estas utila kaj profita, ĉar se spite de espero la nomitaj ŝtatoj

(¹) *Rim. de l' trad. :* Certe ni rigardus kiel frenezulon tiun, kiu konsilus per flamo estingi bruladon, per malpuraĵo forlavi makulon, per veneno resanigi malsanulon aŭ per mortbato reveki mortinton. Ĉu malplia frenezo estas por certigi pacon proponi militpreparadon? Kaj tamen la homoj, kiuj en siaj ceteraj vivdemandoj estas tiel prudentaj, ne vidas la frenezon de tiu propono. Kiu ne vidas la nunan mondkatastrofon kaj ne komprenas ĝin, tiu estas malespere blinda. Sed kiu povas liberigi sin de tradicia pensmaniero kaj kapablas memstare pensi, devus ekvidi, kian pacon preparis al ni tiuj sofistoj-mensoguloj, kaj ĉiun elparolantan tiun aĉan frazon devus rigardi kiel mizeran trompiton aŭ trompanton.



(Germanio, Aŭstrio, Italio) decidiĝus rompi la pacon kun Rusio, kvankam ĝi kun Dia helpo ankaŭ sola povus defendi sin kaj kontraŭstari al tre potenca malamika alianco, tio estus ne facila, kaj por sukcesa batalado estus necesaj grandaj oferoj kaj perdoj », ktp. (*Kamparana Sendito*, 1893, N° 43.)

Kaj kial en ĉiuj francaj gimnazioj la historio estas instruata laŭ lernolibro, verkita de s-ro Lavisse, 21-a eldono, 1889, en kiu troviĝas jeno :

« Post kiam la ribelo de Komuno estis venkita, en Francio ne estis plu ribelata. Tuj post la milito ĝi dediĉis sin al laboro. Ĝi pagis al Germanio sen malfacilo la grandegan kontribucion de kvin miliardoj. Sed Francio perdis sian militan laŭdon dum la jaro 1870. Ĝi perdis parton de sia teritorio. Pli ol unu kaj duono milionoj da homoj, kiuj loĝis en departementoj *Haut-Rhin*, *Bas-Rhin* kaj *Moselle*, kaj kiuj estis bonaj Francoj, estis devigataj fariĝi Germanoj. Ili ne submetiĝis al sia sorto. Ili abomenas Germanojn ; ili ĉiam esperas refariĝi Francoj. Sed Germanio tenas sian konkeraĵon, kaj tio estas granda lando, kies ĉiuj loĝantoj sincere amas sian patrujon, kaj kies soldatoj estas bravaj, disciplinitaj. Por repreni de Germanio tion, kio estas de ni

prenita, ni devas esti bonaj civitanoj kaj bonaj soldatoj. Por fariĝi bonaj soldatoj, vi devas lerni kompreni la historion de Francio. Historio de Francio montras al ni, ke en nia lando la filoj ĉiam venĝis la malsukceson de siaj patroj. La Francoj, samtempuloj de Karlo VII, venĝis siajn patrojn, venkitaj ĉe *Crécy*, ĉe *Poitiers*, ĉe *Azincourt*... Kaj por vi, — infanoj edukataj nun en niaj lernejoj, — tasko estas venĝi viajn patrojn, venkitajn ĉe *Sedan* kaj *Metz*. Tio estas via devo, granda devo de via vivo. Vi devas pensi pri tio ĉiam... », ktp.

Sur malsupra parto de l' paĝo troviĝas vico da demandoj, konformaj al la paragrafoj. La demandoj estas jenaj : « Kion perdis Francio, perdante partojn de sia teritorio ? Kiom da Francoj fariĝis Germanoj ĉe perdo de tiu teritorio ? Ĉu tiuj Francoj amas Germanion ? Kion ni devas fari por iam repreni la forprenitòn de ni per Germanio ?... »

Krom tio estas ankoraŭ « Pripenso pri la libro VII », kie troviĝas, ke « la infanoj de Francio devas memori pri niaj malvenkoj en la jaro 1870 », ke « ili devas senti en sia koro la pezon de tiu rememoro », kaj ke « tiu rememoro ne devas ilin malkuraĝigi : ĝi devas kontraŭe veki en ili kuraĝon ».



Tial se eĉ en oficialaj paroladoj oni tre persiste parolas pri paco, al popolo, al junaj generacioj kaj ĝenerale al ĉiuj Rusoj kaj Francoj kaŝite senflankiĝe estas inspirata la neceso, rajto, profito kaj eĉ heroeco de milito.

« Ni ne pensas pri milito. Ni nur zorgas pri paco. »

Oni volas demandi : *qui, diable, trompe-t-on ici?* (kiun, diablo, oni trompas tie ĉi ?), se oni devus tion demandi, kaj ne estus tre evidente, kiu estas tiu malfeliĉa trompito.

La trompito estas tiu sama eterne trompata malsaĝa laboranta popolo, tiu sama, kiu per siaj kalozaj manoj konstruis tiujn ŝipojn, fortikaĵojn, arsenalojn, kazematojn, pafilegojn, vaporŝipojn, havenojn, pontojn kaj ĉiujn palacojn, salonegojn, estradojn kaj triumfajn pordojn, kompostis kaj presis ĉiujn tiujn gazetojn kaj librojn, akiris kaj alveturigis ĉiujn ĉi fazanojn, hortulanojn, ostrojn kaj vinojn, kiujn manĝas kaj trinkas ĉiuj ĉi de tiu sama popolo elnutritaj, edukitaj kaj subtenataj homoj, kiuj trompante ĝin, preparas al ĝi la plej terurajn mizerojn ; ĉiam tiu sama bonanima malsaĝa popolo, kiu elstarigante siajn sanajn blankajn dentojn infane oscedas, naive ĝojante je diversaj ornamitaj admiraloj kaj prezidantoj, je de vento blovataj flagoj kaj fajraĵoj, je

tondranta muziko, kaj kiu ne havos tempon por returniĝi, kiam estos plu nek admiraloj, nek prezidantoj, nek flagoj, nek muziko, sed estos nur malseka dezerta kampo, malvarmo, malsato, enuo, antaŭe mortiganta malamiko, malantaŭe neforpermesanta estraro, sango, vundoj, suferoj, putriĝantaj kadavroj kaj sen-senca vana morto.

Kaj homoj, tiaj samaj, kiel tiuj, kiuj nun festenas en Tulono kaj Parizo, sidos post bona tagmanĝo kun neeltrinkitaj glasoj da vino, kun cigaro en la dentoj, en nigra lana tendo kaj per pingloj distingos sur karto tiujn lokojn, kie oni bezonas lasi tiom da el tiu sama popolo konsistanta pafilegviando por preni tiun ĉi aŭ tiun fortikaĵeton aŭ por akiri tiun aŭ alian rubandon aŭ rangon.

## VI

« Sed estas nenio simila, kaj estas neniaj militaj intencoj », oni respondas al ni post tio. « Estas nur, ke du popoloj sentantaj reciprokan simpation, elmontras tion unu al alia. Kia malbonaĵo, se la reprezentantoj de amika nacio estis akceptitaj kun aparta soleno kaj honorado de reprezentantoj de alia popolo? Kia mal-



bonaĵo, se eĉ allasi, ke la alianco povas havi signifon de sindefendo kontraŭ pacon de Eŭropo minacanta danĝera najbaro? »

Malbona estas tio, ke ĉio tio estas plej evidenta kaj impertinenta, per nenio pravigata malbona mensogo. Mensogo estas tiu subite aperinta ekskluziva amo de Rusoj al Francoj, kaj de Francoj al Rusoj; kaj mensogo estas sub tio suspektata nia neamo al Germanoj. Kaj ankoraŭ pli granda mensogo estas tio, ke la celo de ĉiuj tiuj malkonvenaj kaj malsaĝaj orgioj estas kvazaŭa subteno de eŭropa paco.

Ni ĉiuj scias, ke nek antaŭe, nek nun ni sentas ian apartan amon al Francoj, tiel same, ke ni nek antaŭe, nek nun sentis aŭ sentas malamon kontraŭ Germanoj.

Oni diras al ni, ke Germanio havas iajn intencojn kontraŭ Rusio, ke la triobla alianco minacas la eŭropan pacon kaj nin, kaj ke nia alianco kun Francio ekvilibrigas la fortojn kaj tial certigas la pacon. Sed tiu certigo estas ja tiel evidente malsaĝa, ke la konscienco ne permesas serioze ĝin rebati. Ĉar por ke tio estu vera, t. e. por ke la alianco certigu la pacon, estas necese ke la fortoj estu matematike egalaj. Se la supereco nun troviĝas sur la franco-rusa flanko, la danĝero restas la sama. Eĉ pli granda: ĉar se estis danĝere,

ke Vilhelmo, estranta la eŭropan aliancon, rompos la pacon, estas ankoraŭ pli danĝere, ke Francio, tiu, kiu ne povas paciĝi pri la perdo de siaj provincoj, faros tion. La triobla alianco nomis sin do ligo de paco, kaj por ni ĝi estis ligo de milito. Tiel same nun la franco-rusa alianco ne povas esti konsiderata aliel ol kiel ligo de milito, kiu ĝi ankaŭ estas fakte.

Kaj plue, se la paco dependas de la ekvilibro inter la fortoj, kiel oni difinos tiujn unuojn, inter kiuj estas necese starigi ekvilibron ? Nun la Angloj diras, ke la alianco inter Francio kaj Rusio minacas ilin, kaj tial por ili estas necese starigi novan aliancon, kaj inter kiom da unuoj de aliancoj devas esti dividita Eŭropo por ke estiĝu ekvilibro ? Se do estas tiel, tiam en ĉiu societo de homoj la homo pli forta ol alia estas jam danĝero, kaj ceteraj devas alianciĝi por kontraŭstari al li.

Oni demandas : « Kia malbonaĵo, se Francio kaj Rusio esprimis siajn reciprokajn simpatiojn por certigi pacon ? »

Malbono estas, ke tio estas mensogo, kaj la mensogo neniam estas dirata kaj neniam preterpasas nepunita.

Diablo estas la hommortiganto kaj patro de mensogo. Kaj la mensogo ĉiam kondukas



al hommortigo. Kaj en ĉi tiu okazo tio estas pli evidenta, ol iam ajn.

Do tiel same, kiel nun, tiel ankaŭ antaŭ turka milito subite kvazaŭ ekflamis amo de ni, Rusoj, al iaj fratoj Slavoj, kiujn neniu konis dum jarcentoj, dum Germanoj, Francoj, Angloj ĉiam estis kaj daŭras esti nekompareble pli proksimaj kaj parencaj ol iaj Montenegranoj, Serboj, Bulgaroj. Komenciĝis tiaj samaj ĝojoj, akceptoj, festoj ekscititaj de Aksakovoj kaj Katkovoj, kiujn oni rememoras nun en Parizo kiel modelojn de patriotismo. Tiam kiel nun oni parolis nur pri la reciproka subite ekbrulinta amo inter Rusoj kaj Slavoj. Komence tiel same, kiel nun en Parizo, tiam en Moskvo oni manĝis, trinkis, parolis unu al alia sensencaĵojn, estis kortuŝataj je siaj altaj sentoj, parolis pri la unuiĝo kaj paco, kaj prisilentis la ĉefaĵon — pri la intencoj kontraŭ Turkio. La gazetoj disblovadis la ekscitiĝon ; en la ludo iom post iom eniris la registaro. Leviĝis Serbio. Komenciĝis diplomataj notoj, duonoficialaj artikoloj ; la gazetoj ĉiam pli kaj pli mensogis, elpensadis, ekscitiĝadis kaj finiĝis per tio, ke Aleksandro II, vere ne volinta la militon, devis konsenti je ĝi, kaj fariĝis tio, kion ni scias : la pereo de centmiloj da senkulpaj homoj kaj la bestiĝo kaj malsaĝiĝo de

milionoj. Tio, kio okazis en Tulono kaj Parizo kaj nun plue fariĝas en gazetoj, evidente kondukas al tio sama aŭ pli terura mizero. Tiel same komence sub la sonoj de « Dio gardu caron » kaj « Marsejezo » diversaj generaloj kaj ministroj trinkos por Francio, Rusio, por diversaj regimentoj, armeoj kaj ŝiparoj, presos sian mensogadon gazetoj ; la senlabora amaso da riĉaj homoj, ne sciantaj kiel uzi sian tempon kaj monon, babilados patriotajn paroladojn disblovante la malamon al Germanio, kaj kiom ajn pacema estu Aleksandro III, la kondiĉoj fariĝos tiaj, ke li ne povos rifuzi militon, kiun postulos ĉiuj lin ĉirkaŭantaj, ĉiuj gazetoj kaj kiel tio ĉiam ŝajnas — la ĝenerala opinio de tuta popolo. Kaj ne ekhavos ni tempon por rerigardi, kiam sur la paĝoj de gazetoj aperos kutima, malbonon promesanta sensenca proklamo :

« Per Dia favoro ni, plej aŭtokrata granda Imperiestro de tuta Rusio, pola caro, grandduko de Finlando k. c. k. c., deklaras al ĉiuj niaj fidelaj regatoj, ke por la bono de tiuj konfiditaj al ni de Dio amataj niaj regatoj ni konsideras nian devon antaŭ Dio sendi ilin al mortigado. Kun ili Dio », ktp.

Oni eksonorigos la sonorilojn, vestiĝos en orajn sakojn la longharaj homoj kaj ek-



komencos preĝi por mortigado. Kaj komenciĝos denove la malnova, jam longe konata terura afero.

Ekmoviĝos sub aspekto de patriotismo ekscitantaj homojn al malamo kaj mortigado gazetistoj, ĝojante pri tio, ke ili ricevos duoblan profiton. Agemiĝos ĝoje industriistoj, komercistoj, liverantoj al armeoj, atendante la duoblajn profitojn. Ekmoviĝos diversspecaj oficistoj, antaŭvidante la eblon ŝteli pli multe ol ili ŝtelas ordinare. Ekmoviĝos la militistaj estraroj, ricevantaj la duoblajn salajron kaj porciojn kaj esperatendantaj por la mortigo de homoj diversajn de ili alte ŝatatajn ludaĵetojn : rubandojn, krucojn, galonojn, stelojn. Ekmoviĝos la senlaboraj sinjoroj kaj sinjorinoj, antaŭe anoncantaj sin por la Ruĝa Kruco, pretigantaj sin bandaĝi tiujn, kiujn mortigos iliaj edzoj kaj fratoj, imagante al si, ke ili faras per tio plej kristanan aferon.

Kaj surdigante en sia animo la malesperon per kantoj, malĉasto kaj brando, ekmarŝos la deŝiritaj de paca laboro, de siaj edzinoj, patrinoj, infanoj homoj, centmiloj da simplaj bonaj homoj kun la iloj de mortigo en manoj tien, kien oni ilin pelos. Ili marŝos, frostos, malsatos, malsanos, mortos de malsanoj, kaj fine venos al tiu loko, kie oni ekkomencos

mortigi ilin po miloj, kaj ili mortigos po miloj, ne sciante mem kial, homojn, kiujn ili neniam vidis, kiuj faris al ili nenion kaj povas fari nenion malbonan.

Kaj kiam estiĝos tiom da malsanuloj, vunditoj kaj mortigitoj, ke estos neniu por ilin kolekti, kaj kiam aero estos tiel infektita per tiu putranta pafilegviando, ke fariĝos malagrable eĉ al la estraro, tiam estos halto por iom da tempo, iel ajn oni kolektos la vunditojn, kunveturigos, kunmetos en amason ien ajn la malsanulojn, kaj la mortigitojn enteriĝos, superŝutos ilin per kalko, kaj denove kondukos la tutan amason el trompitoj pluen, kaj kondukos ilin tiel tiom longe, ĝis tio enuigos tiujn, kiuj elpensis ĝin, aŭ ĝis tiuj, al kiuj tio estis necesa, ricevos ĉion, kio estis al ili necesa.

Kaj denove sovaĝiĝos, krueliĝos, bestiĝos la homoj kaj malpliiĝos en mondo la amo, kaj komenciĝinta kristaniĝo de l' homaro denove retiriĝos por jardekoj aŭ -centoj. Kaj denove tiuj homoj, al kiuj tio estas profita, kun konvinko parolos, ke se estis milito, tio signifas, ke ĝi estas necesa, kaj denove oni preparos por tio la estontajn generaciojn, de infaneco malmoraligante ilin.



## VII

Tial, kiam aperas tiaj patriotaj manifestacioj, kiel Tulonaj solenaĵoj, kiuj kvazaŭ nur el malproksime, sed jam anticipe ligas la volon de homoj kaj devigas ilin al tiuj kutimaj malbonfaroj, kiuj ĉiam elfluas el patriotismo, — ĉiu komprenanta la signifon de tiaj solenaĵoj ne povas ne protesti kontraŭ ĉio tio, kio silente estas entenata en ili. Kaj tial, kiam sinjoroj ĵurnalistoj presigas, ke ĉiuj Rusoj kunsentas kun tio, kio okazis en Kronŝtato, Tulono, Parizo, ke tiu alianco estas ligita por vivo kaj morto per volo de tuta popolo, kaj kiam la rusa kultministro certigas la francajn ministrojn, ke tuta lia subularo — rusaj infanoj, scienculoj kaj verkistoj dividas liajn sentojn, aŭ kiam la estro de rusa eskadro certigas Francojn, ke tuta Rusio estos danka al ili por ilia akcepto, kaj kiam ĉefpresbiteroj respondas pri siaj paŝtatoj kaj certigas, ke la preĝoj de l' Francoj por la vivo de alta domo ĝoje resonis en koroj de *caramanta* popolo, kaj kiam rusa ambasadoro en Parizo, konsiderata kiel reprezentanto de rusa popolo, post la tagmanĝo *ortolans à la soubise et logopèdes glacées* kun la kaliko

de ĉampano *grand Moët* en la manoj diras, ke la koroj de ĉiuj Rusoj batas unisone kun lia koro, superplenigita per subita kaj ekskluziva amo al bela Francio, tiam ni homoj liberaj de malsaĝiĝo konsideras kiel nian sanktan devon ne nur por ni, sed ankaŭ por dekoj da milionoj da rusaj homoj en plej decida maniero protesti kontraŭ tio kaj deklari, ke niaj koroj ne batas unisone kun la koroj de sinjoroj ĵurnalistoj, kultministroj, ŝiparestroj, ĉefpresbiteroj kaj ambasadoroj, sed kontraŭe estas plenaj je kolero kaj abomeno pri tiu malutila mensogo kaj pri tiu malbono, kiujn ili konscie aŭ nekonscie disvastigas per siaj konduto kaj paroladoj. Trinku ili *Moët'*on kiom ili volas, skribu artikolojn kaj diradu paroladojn de si kaj por si, sed ni ĉiuj kristanoj, konsiderantaj nin kiel tiaj, ne povas allasi, ke ĉio, kion diras kaj skribas tiuj homoj, ligas nin. Ne povas ni allasi tion tial, ke ni scias, kio kaŝiĝas sub ĉiuj tiuj ebriaj ravoj, paroladoj kaj ĉirkaŭprenoj, similantaj ne al firmigo de paco, kiel oni nin certigas, sed pli al tiuj orgioj kaj drinkadoj, al kiuj sin fordonas la malbonintenculoj pretigante sin al krimfaro.



## VIII

Antaŭ kvar jaroj la unua hirundo de Tulona printempo — unu konata franca agitisto por la milito kontraŭ Germanio — alveturis Rusion por prepari franco-rusan aliancon, kaj estis ĉe ni en vilaĝo. Li alveturis al ni, dum ni laboris ĉe fojnfalĉado. Reveninte hejmen dum la matenmanĝo ni konatiĝis kun la gasto, kaj li tuj rakontis al ni, kiel li militis, estis en kaptitejo, forkuris el ĝi kaj kiel li solene promesis, pro kio li evidente estis fiera : ne ĉesi agiti por la milito kontraŭ Germanio tiel longe, ĝis la tuto kaj honoro de Francio estos restarigitaj.

En nia rondo ĉiuj argumentoj de nia gasto pri tio, kiom necesa estas la alianco inter Rusio kaj Francio por restarigo de antaŭaj limoj de Francio, ĝia antaŭa potenco kaj honoro, kaj por nia asekuro kontraŭ malutilaj projektoj de Germanio, havis nenian sukceson. Al liaj argumentoj pri tio, ke Francio ne povas trankviliĝi tiel longe ĝis ĝi ne reprenos la forprenitajn provincojn, ni respondis, ke ĝuste tiel same Prusio ne povis trankviliĝi, ĝis ĝi repagis por Jena, kaj se la revenĝo de Francoj nun estos sukcesa, la Germanoj devos denove repagi, kaj tiel senfine.

Al liaj pruvoj, ke la Francoj devas savi siajn forŝiritajn fratojn, ni respondis, ke la stato de laboranta loĝantaro de Elzaso-Lotaringio sub la regado de Germanio apenaŭ en io ajn fariĝis pli malbona, ol ĝi estis sub regado de Francio, kaj ke pro tio, ke al kelkaj Elzasanoj estas pli agrable aparteni al Francio ol al Germanio, pro tio ke al li, nia gasto, estas dezirinde restarigi la laŭdon de francaj armiloj, ne nur neniel valoras ekkomenci tiujn terurajn mizerojn, kiujn kaŭzas milito, sed pro tio oni ne rajtas oferi eĉ unu homan vivon.

Al liaj pruvoj, ke al ni estas facile tiel diri, ĉar ni ne spertis tion saman, kion Francio, kaj ke ni ekparolus aliel, se de ni estus deprenitaj ĉebaltmaraj provincoj, Polio, ni respondis, ke eĉ de ŝtata vidpunkto la depreno de ni de ĉebaltmaraj provincoj aŭ de Polio neniel povas esti konsiderata kiel malfeliĉo, sed pli vere tion ni povas konsideri kiel bonaĵon, ĉar tio malpligrandigus la neceson de militforto kaj de ŝtataj elspezoj ; kaj de kristana vidpunkto ni neniel povas allasi militon, ĉar la milito postulas la hommortigon, kaj la kristanismo ne nur malpermesas ĉiun mortigon, sed postulas la bonfaradon al ĉiuj homoj sen diferenco de nacioj, konsiderante ĉiujn kiel fratojn. La kristana ŝtato, parolis ni, komencante militon por esti konsekvenca, devus ne nur forigi la krucojn de preĝejoj, la preĝejojn mem ŝanĝi en lokojn por aliaj celoj, al pastraro doni aliajn oficojn kaj ĉefe malpermesi evangelion (1), — sed devas malkonfesi ĉiujn postulojn de moralo, kiuj elfluas el kristana leĝo. *C'est à prendre ou à laisser,* parolis ni. Tiom longe, kiom la kristanismo ne estas detruita, logi la homojn en militon oni povos nur per ruzo kaj trompo, kiel estas farata nun.

Ni vidas tiun ruzon kaj trompon, kaj ne povas cedi al ili. Kaj ĉar ĉe tio ĉi estis nek muziko, nek ĉampano, nek io malsaĝiganta nin, nia gasto nur eklevis la ŝultrojn kaj kun al Francoj propra ĝentilo diris, ke li estas tre danka por la amika akcepto, kiun li ricevis en nia domo, kaj ke li tre bedaŭras, ke liaj pensoj ne ricevis tion saman.

## IX

Post tiu interparolado ni iris al la fojnofalĉado kaj tie li, esperante ĉe la popolo trovi pli multe da simpatio por siaj celoj, petis min

(1) *Rim. de l' trad. :* Antaŭ ne longe la gazetoj anoncis, ke rusa cenzuro forstrekis la citaĵojn el Surmonta Prediko.

traduki al maljuna, malsana kun granda hernio kaj spite tio tre bona laboranto-vilaĝano Prokopij lian planon influi Germanojn; lia plano estis kunpremi la en mezo de Francoj kaj Rusoj troviĝantan Germanon. La Franco per gestoj montris tion al Prokopij, per siaj blankaj fingroj de ambaŭ flankoj tuŝante la ŝvitan tolaĉan ĉemizon de Prokopij. Mi memoras la bonaniman mokeman miron de Prokopij, kiam mi klarigis al li la vortojn kaj gestojn de l' Franco. La proponon pri premo de Germano de du flankoj Prokopij evidente prenis kiel ŝercon, ne allasante la penson, ke plenaĝa kaj klera homo povus kun trankvila spirito kaj en neebria stato paroli pri tio, ke estas dezirinde militi.

— Kio do, se ni lin de ambaŭ flankoj premos, — respondis li per ŝerco al la, kiel li pensis, ŝerco, — al li restos nenien sin retiri; oni devas ja al li ankaŭ spacon doni.

Mi tradukis tiun respondon al mia gasto.

— Diru al li, ke ni amas Rusojn, — diris li.

Tiuj vortoj videble mirigis Prokopij ankoraŭ pli multe ol la propono pri ĉirkaŭpremo de Germano, kaj elvokis iun senton de suspekto.

— Kies li estas? — demandis min Prokopij, malkonfide montrante per la kapo mian gaston.

Mi diris, ke li estas Franco, riĉa homo.



— Kio do, pro kia afero? — demandis Prokopij.

Kiam mi klarigis al li, ke li alveturis por elvoki Rusojn al alianco kun Francio en okazo de milito kontraŭ Germanio, Prokopij videble restis tute malkontenta, kaj turnante sin al laboristinoj, sidintaj ĉe fojnamaso, severvoĉe, nevole esprimante la sentojn elvokitajn en li per tiu interparolo kriis al ili, ke ili iru rasti en fojnamasojn la ankoraŭ nefinrastitan fojnon.

— Nu vi, kornikinoj, ekdormetis. Iru antaŭen. Kia nun tempo por Germanon premi. La fojno estas ankoraŭ ne forveturigita, kaj ŝajnas, ke de merkredo oni iros rikolti, — diris li. Poste, kvazaŭ timante ofendi per tiu rimarko la fremdan alveturintan homon, li aldonis, montrante pro bonkora rideto siajn duone forputrintajn dentojn: — pli bone venu al ni labori, kaj alsendu ankaŭ Germanon. Kiam ni finos la laboron, ni ekfestenos. Prenos ankaŭ Germanon. Estas ja tiaj samaj homoj.

Kaj dirinte tion, Prokopij deprenis sian manon de forkego, sur kiu li sin apogis, metis ĝin sur la ŝultrojn kaj foriris al la laboristinoj.

— Ho, brava homo — ekkriis, ridante, ĝentila Franco, kaj per tio finis tiam sian diplomatan mision al rusa popolo.

La aspekto de tiuj du tiel kontraŭaj homoj

— brilanta per freŝo, mallaco, eleganto de bone nutrita Franco en cilindra ĉapelo kaj en longa tiam plej moda mantelo, per siaj nelaboraj blankaj manoj energie montranta per gestoj kiel oni devas kunpremi Germanojn, — kaj la aspekto de malglata, kun haŭteroj en haroj, sekiĝinta de laboro, bruligita, ĉiam lacigita kaj malgraŭ sia granda hernio ĉiam laboranta Prokopij, kun siaj de laboro ŝvelintaj fingroj, en malsuprenpendantaj pantalonoj, disŝiritaj bastoŝuoj, paŝanta kun grandega fojnamaso sur forko sur siaj ŝultroj per tiu ne maldiligenta, sed ekonomia je movoj irmaniero, per kiu ĉiam moviĝas laboristo, — la aspekto de tiuj du tiel kontraŭaj homoj tiam multon klarigis al mi kaj vive rememoris mi nun post Tulono-Parizaj festoj.

Unu el ili personigis ĉiujn tiujn per laboro de popolo nutritajn homojn, kiuj poste uzas tiun popolon kiel pafilegviandon ; kaj Prokopij — tiun saman pafilegviandon, kiu nutras kaj prizorgas tiujn homojn, kiuj regas ilin.

## X

« Sed de Francoj estas forprenitaj du provincoj, estas deŝiritaj infanoj de amanta patrino. Sed Rusio ne povas toleri, ke Germanio ordonu al ĝi leĝojn kaj senigu ĝin de ĝia historia



destino en oriento, — ne povas allasi la eblon depreni de ĝi, kiel de Francio, ĝiajn provincojn : ĉebaltan provincon, Polion, Kaŭkazon. Kaj Germanio ne povas allasi la eblon perdi tiujn profitojn, kiujn ĝi gajnis per tiom da viktimoj. Kaj Anglio povas al neniu cedi sian maran superecon. »

Kaj eldirinte tiajn vortojn, kutime oni supozas, ke Franco, Ruso, Germano kaj Anglo devas esti pretaj oferi ĉion por repreno de forprenitaj provincoj, por fortigo de sia influo en oriento, por konservo de siaj unueco kaj potenco, de regado sur maroj ktp.

Supoziĝas, ke la sento de patriotismo estas, unue, ĉiam propra al ĉiuj homoj, kaj, due, estas tia alta morala sento, ke se ĝi forestas, ĝi devas esti ekscitata en tiuj, kiuj ĝin ne havas. Sed kiel la unua, tiel la dua estas malvera. Mi travivis duonjarcenton meze de rusa popolo, kaj en granda amaso da vera rusa popolo dum tuta tiu tempo neniun fojon mi vidis aŭ aŭdis la elmontron aŭ esprimon de tiu patriotisma sento, se ne konsideri tiujn lernitajn dum militservo aŭ ripetatajn el libroj patriotajn frazojn, kiujn oni aŭdas de plej malprofundpensaj kaj malbonigitaj homoj el popolo. Mi neniam aŭdis de popolo esprimon de patriotismaj sentoj, sed kontraŭe, konstante

de plej seriozaj, honorindaj homoj el popolo mi aŭdis la esprimon de perfekta indiferento kaj eĉ malestimo je diversspecaj elmontroj de patriotismo. Tion saman mi observis ankaŭ ĉe laborista popolo de aliaj ŝtatoj, kaj tion saman asertis al mi ne unufoje la kleraj Francoj, Germanoj kaj Angloj pri sia laborista popolo [1].

La laboranta popolo estas tro okupata per absorbanta la tutan sian atenton laboro por sia vivsubteno kaj tiu de sia familio, ol ke ĝi povus interesiĝi je tiuj politikaj demandoj, kiuj montriĝas kiel ĉefaj motivoj de patriotismo : la demandoj pri rusa influo en oriento, pri unueco de Germanio, aŭ pri repreno de francaj forprenitaj provincoj, aŭ pri cedo de tiu aŭ alia parto de unu ŝtato al alia ktp., ne interesas ĝin ne nur tial, ke ĝi preskaŭ neniam konas tiujn kondiĉojn, en kiuj estiĝas tiuj demandoj, sed ankaŭ tial, ke la interesoj de ĝia vivo estas tute sendependaj de ŝtataj, politikaj interesoj. Al homo el popolo estas ĉiam tute egale, kie oni metos ian limon... kaj eĉ al kiu registaro ĝi devos pagi impostojn kaj en armeon doni siajn filojn; sed al ĝi estas ĉiam tre grave scii, kiom da impostoj ĝi devos pagi, kiel longe servi en armeo, kiel longe pagi por tero kaj kiom ricevi por sia laboro — ĉiuj demandoj tute nedependantaj de ĝeneralaj ŝtataj politikaj interesoj. Kaj certe sekve de tio okazas, ke malgraŭ ĉiuj plifortigitaj rimedoj, uzataj de registaroj por inspiri al popoloj ne propran al ili patriotismon kaj por subpremo en popoloj de la disvolviĝantaj en ĝi ideoj de socialismo — socialismo ĉiam pli kaj pli enpenetras la popolamason, kaj la patriotismo, tiel peneme inspirata de registaroj, ne nur ne estas akceptata de popoloj, sed pli kaj pli malaperas, kaj tenas sin nur en superaj klasoj, al kiuj ĝi estas profita. Se eĉ okazas, ke patriotismo ekkaptas la popolamason, kiel estis nun en Parizo, tio okazas nur tiam, kiam tiu popolamaso submetiĝas al plifortigita hipnotisma influo de registaroj kaj de regantaj klasoj, kaj patriotismo tenas sin en popolo nur tiom longe, kiom daŭras tiu influo.

Ekzemple en Rusio, kie patriotismo en formo de amo kaj sindono al religio, caro kaj patrujo kun neordinara streĉiteco per ĉiuj en

[1] *Rim. de l' trad. :* Kiel Litovo mi havis sufiĉe ofte okazon vidi, kiel peneme kaj ofte malsukcese la litova intelektularo, precipe pastraro, penis inspiri naciismon al litova popolo. En la jaro 1913, rekordjaro de elmigrado Amerikon, mi kolektis la statistikon de nacieco de elmigrantoj kaj ĉe tio povis ĝissatege observi la indiferenton de diverspopolaj laboristoj kontraŭ naciismo.

manoj de registaro troviĝantaj iloj de eklezio, lernejo, gazetaro kaj ĉia soleneco estas inspirata al popolo, la rusa laborista homo — cent milionoj da rusa popolo, malgraŭ tiu nemeritita reputacio esti popolo neordinare sindona al sia religio, caro kaj patrujo, estas popolo la plej libera de patriotisma trompo [1] kaj de sindono al religio, caro kaj patrujo. Sian kredon, tiun ŝtatan ortodoksan, al kiu ĝi kvazaŭ estas sindona, ĝi plejparte ne scias, kaj tuj kiam ĝi ĝin ekkonas, forĵetas ĝin kaj fariĝas racionalisto, t. e. akceptas tian religion, kiun oni povas nek ataki, nek defendi; al sia caro, malgraŭ la senhaltaj, plifortigitaj inspiroj en tiu direkto, ĝi rilatas kiel al ĉiuj perfortaj estroj, se ne kun juĝo, tiel kun perfekta indiferento; sian patrujon, se sub tio ne kompreni sian vilaĝon aŭ komunumon, ĝi aŭ tute ne konas, aŭ se konas, faras inter ĝi kaj aliaj ŝtatoj nenian diferencon. Tiel, kiel antaŭe rusaj elmigrantoj iris Aŭstrion, Turkion, tiel ankaŭ nun ili koloniiĝas tute indiferente en Rusio, ekster Rusio, en Turkio aŭ Ĉinio.

---

[1] *Rim. de l' trad.* : Tion pruvas ankaŭ la internacieco de rusa literaturo, kion konstatas ankaŭ unu germana gazeto eĉ dum milito.



# XI

Mia malnova amiko D., dum vintro loĝante sola en vilaĝo, dum lia edzino, kiun li malofte tie vizitis, loĝis en Parizo, en longaj aŭtunaj vesperoj ofte interparoladis kun vilaĝano nescianta legi, sed tre prudenta kaj honorinda administristo de komunumo, kiu venadis vespere kun raportoj, kaj mia amiko rakontis al li interalie ankaŭ pri la supereco de franca ŝtatordo kompare kun nia. Tio estis ĵus antaŭ la lasta pola ribelo kaj franca enmiksiĝo en niaj aferoj. La patriotaj rusaj gazetoj ekbrulis tiam per indigno kontraŭ tiu enmiksiĝo kaj tiel incitis la regantajn klasojn, ke la situacio fariĝis tre streĉita, kaj ĉe ni oni ekparolis pri milito kontraŭ Francio.

Mia amiko, leginte gazetojn, rakontis al sia administristo ankaŭ pri tiuj rilatoj inter Rusio kaj Francio. Submetiĝante al spirito de gazetoj mia amiko diris, ke se ekestos milito, li enarmeiĝos (li estis maljuna militisto) kaj militos kontraŭ Francio. Tiam revenĝo je Francio al rusaj patriotoj ŝajnis necesa pro Sebastopolo.

— Kiacele bezonas ni militi? demandis la administristo.

— Kiel do ni povus permesi al Francio ordoni ĉe ni?

— Sed vi mem ja diras, ke ĉe ili estas pli bona ordo ol ĉe ni, diris la administristo tute serioze. Lasu ni ilin enkonduki ordon ankaŭ ĉe ni.

Kaj mia amiko rakontis al mi, ke tiu rezonado tiel konsternis lin, ke li tute ne sciis kion respondi, kaj ke li nur ekridis, kiel ridas homoj vekiĝinte el trompa sonĝo.

Similan rezonadon oni povas aŭdi de ĉiu neebria rusa laborista homo, se nur li ne troviĝas sub la hipnotisma influo de registaro. Oni parolas pri amo de rusa popolo al sia kredo, caro kaj patrujo, dume en Rusio troviĝas nenia vilaĝansocieto, kiu almenaŭ minuton pripensus kion elekti el du estontaj lokoj de koloniiĝo: unu en Rusio kun patro-caro, kiel oni skribas en libretoj, kaj kun sankta ortodoksa kredo en sia adorata patrujo, sed kun malpli granda kaj malpli bona tero, aŭ sen patro blanka-caro kaj sen ortodoksa kredo ie ajn ekster Rusio, en Prusio, Ĉinio, Turkio, Aŭstrio, sed kun iom pli granda kaj pli bona tero, kion ni vidis antaŭe kaj vidas nun. Por ĉiu rusa vilaĝano la demando pri tio, sub kiu registaro ili estos (ĉar li scias, ke sub kia ajn li estus, oni egale prirabos lin), havas ne-



kompareble malplian signifon ol la demando — mi ne diras jam: ĉu bona estas akvo, sed ĉu mola estas argilo kaj ĉu bone naskiĝas brasiko.

Oni povas ekpensi, ke la indiferento de Rusoj devenas de tio, ke ĉiu registaro, en kies potencon ili transirus, estos certe pli bona ol rusa, ĉar en Eŭropo estas nenia pli malbona; sed tio ne estas tiel: kiom mi scias, tion saman ni vidis ĉe la koloniistoj Angloj, Holandanoj, Germanoj, elmigrantaj Amerikon, kaj ĉe diversaj aliaj nacioj enmigrantaj Rusion.

La transiroj de eŭropaj popoloj el la potenco de unu registaro en la potencon de alia, el la turka en la aŭstran, aŭ el franca en germanan, tiel malmulte ŝanĝas la situacion de popolo, ke neniel povas elvoki malkontenton en laborista popolo, se nur ĝi ne estos artifike submetita al influoj de registaroj kaj de regantaj klasoj.

## XII

Kutime kiel pruvon por ekzisto de patriotismo oni nomas la elmontron de patriotaj sentoj de popolo dum diversaj solenoj, kiel ekzemple en Rusio dum carkronado aŭ dum renkonto de caro post la vagonarelreliĝo la 17-an de

oktobro, aŭ en Francio dum militdeklaro al Prusio, aŭ en Germanio dum provenkaj solenoj, aŭ dum franco-rusaj festoj.

Sed oni devas scii, kiel oni preparas tiujn manifestaciojn. En Rusio, ekzemple, ĉe ĉiu pretervojaĝo de imperiestro oni komisias el vilaĝanaj societoj kaj el fabrikoj homojn por renkontoj kaj salutoj al caro.

La ĝojkrioj de popolamaso plejparte estas artifike preparataj de tiuj, al kiuj ili estas necesaj, kaj la grado de popola ravo montras nur la artgradon de aranĝintoj de tiuj ĝojkrioj. Tiu afero estas jam delonge praktikata kaj tial la specialistoj-aranĝantoj de tiuj ĝojkrioj en sia preparado atingis altan gradon de virtuozeco.

Kiam Aleksandro II estis ankoraŭ kronprinco kaj komandis, kiel estas kutimo, la preobraĵenskan regimenton, foje posttagmeze li alveturis al regimento, troviĝinta en tendaro. Tuj kiam montriĝis lia veturilo, la soldatoj, kvankam ili estis nur en ĉemizoj, elkuris lin renkonti kaj kun tia ĝojo renkontis, kiel oni skribas, sian altan komandanton, ke ĉiuj vete kuris post la veturilo kaj multaj el ili kurante faris krucsignon, ĉe tio rigardante la kronprincon. Ĉiuj, kiuj vidis tiun renkonton, estis kortuŝitaj de tiu naiva sindonemo kaj amo de rusa soldato al caro kaj lia heredanto, kaj de



tiu religia kaj videble nepreparita ravo, kiu montriĝis en vizaĝoj, en movoj kaj precipe en faro de krucsignoj. Kaj tamen ĉio tio estis farita artifike kaj preparita jene.

Post la parado la antaŭan tagon, la kronprinco diris al brigada komandanto, ke li alveturos morgaŭ.

— Kiam atendi vian imperiestran moŝton ?

— Verŝajne vespere. Nur mi petas, ke estu neniaj preparoj.

Tuj kiam la kronprinco forveturis, la brigada komandanto kunvokis rotajn komandantojn kaj ordonis, ke por morgaŭa tago ĉiuj soldatoj estu en puraj ĉemizoj. Kaj tuj kiam ili ekvidos la veturilon de l' kronprinco, kiun devas atendi la signaldonantoj, ĉiuj kuru kiel ajn renkonten kaj kun la krioj « hura » kuru post la veturilo, ĉe kio ĉiu deka homo en la roto kurante faru krucsignon. La ĉefserĝentoj starigis rotojn, kaj kalkulante po unu haltis sur la deka : « unu, du, tri... ok, naŭ, dek, Sidorenko — fari krucsignon ; unu, du, tri, kvar... Ivanov — fari krucsignon ». Ĉio estis plenumita laŭ ordono, kaj afekcio de ravo komunikiĝis al la kronprinco, al ĉiuj ĉeestantoj, eĉ al soldatoj kaj oficiroj, kaj eĉ al brigada komandanto, kiu mem ĉion tion elpensis. Tiel same, kvankam ne tiel maldelikate, estas far-

ate ĉie, kie estas patriotaj manifestacioj. Ekzemple, franco-rusaj festoj, kiujn oni prezentas al ni kiel spontanajn elmontrojn de popolaj sentoj, fariĝis ne per si mem, sed estis kontraŭe artifike kaj sufiĉe videble preparitaj kaj elvokitaj de l' franca registaro.

« Tuj kiam fariĝis konata la alveturo de rusaj maristoj (mi citas denove el tiu sama *Kamparana Sendito*, registara organo, kolektanta siajn sciigojn el ĉiuj aliaj gazetoj), ne nur en ĉiuj grandaj kaj malgrandaj urboj, kuŝantaj sur sufiĉe longa vojo inter Tulono kaj Parizo, sed ankaŭ en multegaj urboj kaj urbetoj, kuŝantaj tute flanke en granda distanco de tiu vojo, fondiĝis komitatoj por preparo de festoj. Ĉie oni kolektis ofersumojn por elspezoj ĉe tiuj festoj. Multaj urboj sendis deputaciojn Parizon al nia imperiestra ambasadoro kun peto, ke rusaj maristoj vizitu tiujn urbojn almenaŭ por unu tago, aŭ eĉ por unu horo. La urbestraroj de tiuj urboj, kiujn devis viziti niaj maristoj, disponis grandegajn monsumojn, pli ol po cent mil rubloj por preparo de diversaj festoj kaj amuzoj, kaj eldiris sian preton elspezi por tio ankoraŭ pli grandajn sumojn, kiom estos necese, por ke nur la renkonto kaj festoj okazu kiel eble plej belegaj.

« En Parizo mem krom la sumo, kiun disponigis por tio la urbestraro, estis kolektita granda sumo de privata komitato ankaŭ por preparo de amuziĝoj, kaj la franca registaro disponigis cent mil rublojn por elspezoj je honorado de rusaj gastoj fare de ministroj kaj aliaj estroj. En multaj urboj, kiujn niaj maristoj tute ne vizitos, tamen estas decidite aranĝi la 1-an de oktobro diversajn festojn je honoro de Rusio. Multegaj urboj kaj provincoj decidis sendi Tulonon aŭ Parizon specialajn delegitarojn por saluti rusajn gastojn kaj prezenti al ili donacojn je memoro pri Francio aŭ sendi al ili salutajn skribaĵojn kaj telegramojn. Estas decidite la 1-an de oktobro ĉie konsideri kiel popolan feston kaj la lernantojn liberigi por tiu tago de lernado, en Parizo eĉ por du tagoj. Al la punitaj malsuperaj militistaj ranguloj pardoni iliajn kulpojn, por ke ili kun danko rememoru la ĝojan por Francio tagon — la 1-an de oktobro.

« Por faciligi al publiko deziranta viziti Tulonon kaj ebligi al ĝi partopreni en renkonto de rusa eskadro, la fervojoj malaltigis la veturpagon je duono kaj aranĝis specialajn ekstervicajn vagonarojn. »

Kaj nun, kiam per tuta vico de ĉiulokaj samtempaj rimedoj, kiujn dank' al estanta en sia mano potenco la registaro ĉiam povas apliki,

ioma parto de l' popolo, precipe la ŝaŭmo de l' popolo — la urba popolamaso, estas metata en nenormalan ekscititan staton, oni diras: Vidu, tio estas memvola esprimo de tutpopola volo. Tiaj manifestacioj, kiel tiuj, kiuj nun okazis en Tulono kaj Parizo... kaj konstante ripetiĝas en Rusio ĉe ĉiuj solenaj renkontoj, pruvas nur tion, ke la rimedoj por artifike eksciti popolon, estantaj nun en la manoj de registaroj kaj de regantaj klasoj, estas tiel potencaj, ke la registaroj kaj regantaj klasoj, posedantaj ilin, ĉiam povas elvoki laŭ sia bonplaĉo kian ajn ili volas patriotan manifestacion, kvazaŭan elmontron de patriotaj popolsentoj. Nenio, kontraŭe, pruvas kun tia evidento la foreston de patriotismo en popolo, kiel rekte tiuj streĉitaj fortuzoj, kiujn aplikas nun la registaroj kaj la regantaj klasoj por artifika ĝia elvoko, kaj tiuj malgrandaj rezultoj, kiuj estiĝas malgraŭ ĉiuj tiuj penadoj.

Se la patriotaj sentoj estas tiel propraj al popoloj, oni devus lasi ilin libere elmontriĝi, sed ne eksciti ilin per ĉiuj konstantaj kaj ekskluzivaj artifikaj rimedoj. Se eĉ nur por kelka tempo, por unu jaro oni ĉesus en Rusio, kiel tion oni faras nun, ĉe surtroniĝo de ĉiu caro devigi la tutan popolon ĵuri al li, ĉesus dum ĉiu diservo solene kelkfoje preĝi la



kutimajn procarajn preĝojn, ĉesus festi kun sonorilsonorado, iluminado kaj kun malpermeso labori la tagojn de lia naskiĝo kaj liajn nomtagojn, ĉesus ĉie elpendigadi kaj elstarigadi liajn portretojn, ĉesus en preĝlibroj, kalendaroj, lernolibroj per grandaj literoj presi lian nomon kaj tiun de lia familio, kaj eĉ de al ili rilataj antaŭnomoj; ĉesus en specialaj libretoj kaj gazetoj nur por tio destinitaj laŭdadi lin; ĉesus juĝi kaj meti en malliberejon pro plej malgranda ne respekta vorto, eldirita pri caro, — se nur eĉ por kelka tempo oni ĉesus fari tion, tiam ni ekvidus, en kia grado estas propra al popolo, al vera laboranta popolo, al Prokopij, al administranto Ivano, kaj al ĉiuj homoj el rusa popolo, kiel je tio oni konvinkadas popolon, kaj estas konvinkitaj ĉiuj eksterlandanoj, adori caron, kiu en tia aŭ alia maniero metas ĝin en manojn de bienposedantoj aŭ ĝenerale riĉuloj. Tiel estas en Rusio; sed ĉesu en Germanio, Francio, Italio, Anglio, Ameriko fari ĉion tion, kion tiel same streĉite faras ankaŭ tie la regantaj klasoj por eksciti patriotismon, sindonemon kaj obeemon al ekzistanta registaro, tiam ni ekvidus, kiom propra estas tiu imagita patriotismo al popoloj de nia tempo.

Kaj fakte jam de infaneco per ĉiuj eblaj

rimedoj — lernejaj lernolibroj, preĝejaj diservoj, predikoj, paroladoj, libroj, gazetoj, versoj, monumentoj — ĉiam en unu kaj tiu sama direkto oni malsaĝigas la popolon, poste oni kolektas perforte aŭ per subaĉeto kelkajn milojn da personoj, kaj kiam tiuj kunvenintaj miloj, al kiuj aliĝos ĉiuj okulumantoj, kiuj ĉiam estas pretaj ĉeesti ĉiun spektaklon, kaj kiam tuta tiu popolamaso ĉe sonoj de pafilegpafado, muziko kaj ĉe apero de ĉia brilo kaj lumo komencos krii tion, kion oni antaŭ ĝi antaŭkrios, oni diras al ni, ke tio estas esprimo de sentoj de tuta popolo. Sed, unue, tiuj miloj, multaj dekmiloj da homoj, kiuj ion krias dum tiaj solenoj, faras nur tre malgrandan dekmilonon da tuta popolo; due, el tiuj dekmiloj da kriantaj kaj ĉapojn svingantaj homoj la pli granda duono se ne estas perforte kunpelita, kiel ĉe ni en Rusio, tiel estas artifike allogita per ia logaĵo; trie, inter ĉiuj tiuj miloj apenaŭ estas dekoj, kiuj komprenas la okazaĵon, kaj tiel same krius kaj svingus ĉapojn, se okazus la perfekta kontraŭaĵo al tio, kio nun okazas; kaj kvare, tie ĉi alestas polico, kiu tuj devigos eksilenti kaj forprenos tiujn, kiuj ekkrius ne tion, kion volas kaj postulas registaro, kiel tio ofte estis farata dum franco-rusaj festoj.

En Francio oni salutis egale rave la militon



kontraŭ Rusio ĉe Napoleono I, kaj poste Aleksandron I, tiun, kontraŭ kiu ili militis, kaj poste denove Napoleonon, kaj denove aliancanojn, kaj Burbonon, kaj Orleanon, kaj respublikon, kaj Napoleonon III, kaj Bulanĵe; en Rusio oni salutas egale rave hodiaŭ Petron, morgaŭ Ekaterinon, postmorgaŭ Paŭlon, Aleksandron, Konstantinon, Nikolajon, dukon de Lejĥtenberg, fratojn-slavojn, prusan reĝon kaj francajn maristojn kaj ĉiujn tiujn, kiujn la estraro ekvolos saluti.

Precize tio sama okazas en Anglio, Ameriko, Germanio, Italio.

Tio, kio en nia tempo estas nomata patriotismo, estas unuflanke difinita emo konstante produktata, kaj subtenata ĉe popoloj per lernejo, religio, per subaĉetebla gazetaro en la por registaro bezona direkto, de alia flanko ĝi estas dumtempa, per specialaj rimedoj de regantaj klasoj produktata ekscitiĝo de malsuperaj je morala kaj eĉ je intelekta nivelo homoj de l' popolo, kiu poste estas prezentata kiel konstanta elmontro de tutpopola volo. La patriotismo de subpremataj popoloj faras neniun escepton. Ĝi estas tiel same ne propra al laborantaj popolamasoj, kaj same artifike inokulata al ili de superaj klasoj.

## XIII

« Sed se homoj el popolo ne havas tiun senton de patriotismo, tio devenas de tio, ke ili ankoraŭ ne disvolviĝis por kompreni tiun altan kaj al ĉiu klera homo propran senton. Se ili ne havas tiun altan senton, oni devas ĝin eduki en ili. Kaj ĝuste tion faras registaro. »

Tiel kutime parolas homoj el regantaj klasoj kun tiel kompleta konvinko, ke patriotismo estas alta sento, ke la naivaj homoj el la popolo ne havantaj tiun senton, konfesas sin kiel kulpuloj pro la foresto ĉe ili de tiu sento, penas konvinki sin, ke ili sentas ĝin, aŭ almenaŭ hipokritas pri tio.

Sed kio estas tiu alta sento, kiu, laŭ opinio de regantaj klasoj, devas esti edukata ĉe popoloj ?

Laŭ plej preciza difino tiu sento estas ne io alia, ol la prefero de sia ŝtato aŭ popolo al ĉiu alia ŝtato aŭ popolo... Estas tre eble, ke tiu sento estas tre dezirinda kaj utila por registaroj kaj por tuto de ŝtato, sed estas neeble ne vidi, ke tiu sento estas tute ne alta, sed kontraŭe tre malsaĝa kaj tre malmorala : malsaĝa ĝi estas tial, ke se ĉiu ŝtato konsideros sin kiel pli bona ol ĉiuj aliaj, estas evidente, ke ili ĉiuj estos malpravaj, kaj malmorala ĝi estas tial, ke ĝi neeviteble devigas ĉiun homon, havanta ĝin, akiradi profitojn por sia ŝtato kaj popolo je la malprofito de aliaj ŝtatoj kaj popoloj, — ĝi estas emo rekte kontraŭa al la fundamenta, de ĉiuj akceptata morala leĝo : ne fari al alia kaj aliaj, tion, kion ni ne volus, ke oni faru al ni.

La patriotismo povis esti virto en la antikva mondo, kiam ĝi postulis de homo servadon al plej alta — al homo de tiu tempo atingebla — idealo de patrujo. Sed kiel povas patriotismo esti virto en nia tempo, kiam ĝi postulas de homoj la rektan kontraŭon de tio, kio faras la idealon de nia religio kaj moralo — ne konfeson de egaleco kaj frateco de ĉiuj homoj, sed la konfeson de supereco de unu ŝtato aŭ popolo sur ĉiuj ceteraj. Tiu sento en nia tempo ne nur ne estas virto, sed ĝi estas senduba krimo ; tiu sento, t. e. patriotismo en vera sia signifo en nia tempo eĉ ne povas ekzisti, ĉar por ĝi estas nek materiaj, nek moralaj fundamentoj.

La patriotismo povis havi sencon en antikva mondo, kiam ĉiu popolo pli malpli unuspeca en sia konsisto, konfesanta unu ŝtatan religion

kaj submetiĝanta al unu nelimigita potenco de sia adorata reganto, prezentis el si kvazaŭ insulon en la oceano de barbaroj konstante celanta ĝin subakvigi.

Estas kompreneble, ke ĉe tia situacio la patriotismo, t. e. la deziro defendi sin kontraŭ la atakoj de barbaroj, pretaj detrui ne nur la socian ordon, sed minacantaj per rabadoj, per tutpopola mortigado, per malliberigado kaj sklavigado de viroj, per eldevigoj de virinoj, estis sento natura, kaj estas kompreneble, ke la homo por savi sin kaj siajn sampatrujanojn de tiaj mizeroj povis preferi sian popolon al ĉiuj ceteraj kaj havi malamikan senton al ĉirkaŭantaj lin barbaroj kaj mortigi ilin por defendi sian popolon.

Sed kian signifon povas havi tiu sento en nia kristana tempo? Pro kio kaj por kio la homo de nia tempo, Ruso povas iri mortigi Francojn, Germanojn, aŭ Franco Germanojn, kiam li tre bone scias, kiom ajn li estus neklera, ke homoj de alia ŝtato aŭ nacio, kontraŭ kiu estas ekscitata lia patriota malamikeco, estas ne barbaroj, sed precize tiaj samaj homoj — kristanoj, kiel li mem, ofte eĉ de unu kun li kredo kaj konfeso, precize tiel same kiel li dezirantaj nur pacon kaj pacan interŝanĝon de laboro, kaj krom tio plejparte ligataj kun



li per interesoj de komuna laboro, aŭ per komercaj aŭ spiritaj interesoj, aŭ per tiuj kaj aliaj kune. Sufiĉe ofte por homoj de unu ŝtato la homoj de alia ŝtato estas pli proksimaj kaj pli necesaj, ol liaj sampatrujanoj, kiel okazadas ĉe laboristoj ligataj kun labordonantoj de aliaj popoloj, por komercistoj kaj precipe por scienculoj kaj artistoj.

Krome mem la vivkondiĉoj tiel aliiĝis nun, ke tio, kion ni nomas nia patrujo, tio, kion ni devas iel diferencigi de ĉio alia, ĉesis esti klare difinita, kiel tio estis ĉe antikvuloj, kie la homoj farantaj unu patrujon apartenis al unu nacio, al unu ŝtato kaj unu religio. Estas komprenebla la patriotismo de Egiptano, de Hebreo, de Greko, kiuj defendante sian patrujon, kune defendis ankaŭ sian religion, sian nacion, sian patrujon kaj sian ŝtaton.

Sed en kio esprimiĝos en nia tempo la patriotismo de Irlandano en Usono, laŭ sia religio apartenanta al Romo, laŭ nacio — al Irlando, laŭ ŝtataneco al Usono? En tia sama situacio troviĝas Ĉeĥo en Aŭstrio, Polo en Rusio, Prusio kaj Aŭstrio, Hindo en Anglio, Tataro kaj Armeno en Rusio kaj Turkio. Sed ne parolante jam pri tiuj apartaj konkeritaj nacioj, la homoj de plej unuspecaj ŝtatoj, kiel Rusio, Francio, Prusio, jam ne povas sperti

tiun senton de patriotismo, kiu estis propra al antikvuloj, ĉar tre ofte ĉiuj ĉefaj interesoj de ilia vivo, iafoje familiaj — li estas edziĝinta kun virino el alia popolo; ekonomiaj — liaj kapitaloj troviĝas en eksterlando; spiritaj, sciencaj aŭ artaj — ĉiuj estas ne en propra patrujo, sed ekster ĝi, en tiu ŝtato, kontraŭ kiu estas ekscitata lia patriota malamo.

Sed ĉefe la patriotismo en nia tempo estas neebla tial, ke kiel ajn ni penadis dum 1800 jaroj kaŝi la sencon de kristanismo, ĝi malgraŭ tio penetris en nian vivon kaj ĝis tia grado gvidas ĝin, ke eĉ la homoj plej maldelikataj kaj stultaj jam ne povas ne vidi la nunan tute neeblan kunigon de patriotismo kun tiuj moralaj principoj, laŭ kiuj ili vivas.

## XIV

La patriotismo estis necesa por formi el diversaj nacioj unuigitajn kaj kontraŭ barbaroj defenditajn fortajn ŝtatojn. Sed tuj kiam kristana klerigo egale interne transformis ĉiujn tiujn ŝtatojn, doninte al ili la samajn fundamentojn, la patriotismo fariĝis ne nur nenecesa, sed fariĝis la sola malhelpo por tiu unuiĝo de popoloj, al kiu ili estas pretaj laŭ sia kristana konscio.



La patriotismo en nia tempo estas kruela tradicio de jam forvivinta periodo, kiu tenas sin nur laŭ inerto kaj tial, ke la registaroj kaj regantaj klasoj, sentante, ke kun tiu patriotismo estas kunigita ne nur ilia potenco, sed ankaŭ ilia ekzisto, peneme per ruzo kaj perforto ekscitas kaj subtenas ĝin en popoloj. En nia tempo la patriotismo similas la helpŝtuparojn, estintaj iam necesaj por konstrui la murojn de konstruo, kiuj malgraŭ tio, ke nur sole ili malhelpas la uzadon de konstruo, tamen ne estas forprenataj, ĉar ilia ekzisto estas profita por kelkaj.

Inter la kristanaj popoloj jam delonge estas neniaj kaj povas esti neniaj kaŭzoj por malpacoj. Estas eĉ neimageble, kiel kaj kial la pace kaj kune laborantaj sur la limoj kaj en ĉefurboj rusaj kaj germanaj laboristoj komencos malpaci inter si. Ankoraŭ pli malmulte oni povas imagi la malamikecon inter la Kazana vilaĝano, liveranta panon al Germano, kaj Germano, liveranta al li falĉilojn kaj maŝinojn; tio sama inter francaj, germanaj kaj italaj laboristoj. Kaj pri malpaco inter scienculoj, artistoj, verkistoj de diversaj nacioj, vivantaj per komunaj ne dependantaj de nacieco kaj ŝtataneco interesoj, estas ridinde eĉ paroli.

Sed la registaroj ne povas lasi popolojn en

trankvilo, t. e. en pacaj interrilatoj, ĉar se ne sola, tiel la ĉefa pravigo por la ekzisto de registaroj konsistas en tio, ke ili pacigu popolojn, forigu iliajn malpacajn rilatojn. Kaj jen la registaroj sub la masko de patriotismo elvokas tiujn malpacaĵojn, kaj poste ŝajnigas, kvazaŭ ili pacigus popolojn. Simile kiel cigano, kiu, subŝutinte sub la voston de sia ĉevalo pipron kaj forte batinte ĝin en ĉevalejo, elkondukas ĝin pendante sur la kondukilo, kaj hipokritas, ke li nur penplene povas haltigi la fajran ĉevalon.

Oni certigas nin, ke la registaroj zorgas pri konservado de paco inter la popoloj. Kiel do ili konservas ĝin?

La homoj sur la bordoj de Rejno vivas en paca komunikiĝo inter si, — subite pro diversaj malpacoj kaj intrigoj inter reĝoj kaj imperiestroj komenciĝas milito, kaj ekŝajnas al registaro de Francio necese, kelkajn el tiuj loĝantoj konsideri kiel Francojn. Pasas la jarcentoj; la homoj alkutimiĝis al tiu situacio; denove ekkomenciĝas la malamikeco inter registaroj de grandaj popoloj, kaj pro plej vanta motivo komenciĝas milito, kaj al Germanoj ekŝajnas necese tiujn loĝantojn denove konsideri kiel Germanojn, kaj en ĉiuj Francoj kaj Germanoj oni ekbruligadas la malbondeziron



de unu kontraŭ alian. Aŭ vivas pace sur sia limo Germanoj kaj Rusoj, pace interŝanĝas laboron kaj laborproduktojn, kaj subite tiuj samaj institucioj, kiuj ekzistas nur en nomo de popolpacigado, ekkomencas malpacadi, fari stultaĵon post stultaĵo, kaj povas nenion pli bonan elpensi, ol plej infanan manieron de mempuno, nur por ne cedi sian obstinon kaj malutili al kontraŭulo (kio en tiu ĉi okazo estas precipe oportuna, ĉar tiuj, kiuj preparas la doganan militon, mem ne suferas de ĝi, sed suferas aliaj): organizas tiun doganan militon, kiu antaŭ nelonge estis kondukata inter Rusio kaj Germanio. Kaj inter Germanoj kaj Rusoj kun helpo de gazetoj komencas ekbruli la sento de malbondeziro, kiu estas ankoraŭ plifortigata per franco-rusaj festoj, kaj nur atentu, ĝi povas konduki al sanga milito.

Mi aludis tiujn du lastajn ekzemplojn de registara influado je popolo por eksciti en ĝi la malamon al aliaj popoloj, ĉar ili estas nuntempaj; sed en tuta historio okazis nenia milito, kiu ne estus elvokita de registaroj, sole de registaroj, tute malkonsiderante la profiton de popoloj, al kiuj la milito, eĉ se ĝi estas sukcesa, ĉiam estas malutila.

La registaroj certigas la popolojn, ke ili

troviĝas en danĝero je atakoj de aliaj popoloj kaj de internaj malamikoj, kaj ke la sola rimedo saviĝi de tiu danĝero konsistas en sklava obeemo de popoloj al registaroj. Tio estas kun plena evidento videbla dum revolucioj kaj diktaturoj, kaj tiel estas ĉiam kaj ĉie, kie ekzistas potenco. Ĉiu registaro klarigas sian ekziston kaj praviĝas ĉiujn siajn perfortojn per tio, ke se ĝi ne ekzistus, estus pli malbone. Certiginte la popolojn, ke ili troviĝas en danĝero, la registaroj submetas ilin al si. Kiam la popoloj submetiĝas al registaroj, la registaroj deviĝas la popolojn ankaŭ ataki aliajn popolojn. Kaj tiel al popolo estas pravigataj la asertoj de registaroj pri danĝero de atako fare de aliaj popoloj.

*Divide et impera* (dividu kaj regu).

La patriotismo en sia plej simpla, klara kaj neduba signifo estas ne io alia por la regantoj, ol la ilo por atingi potencavidajn kaj egoistajn celojn, kaj por la regatoj — ĝi estas abnegacio de homa indo, de prudento, konscienco kaj la sklava submetiĝo al tiuj, kiuj havas potencon. Tiel ĝi estas predikata ĉie, kie estas predikata patriotismo.

Patriotismo estas sklaveco.

La predikantoj de paco per arbitracio rezonadas jene : du bestoj ne povas aliel dividi



kaptaĵon ol ekbataliante ; tiel agas infanoj, barbaroj kaj barbaraj popoloj. Sed prudentaj homoj solvas siajn malkonsentojn per rezonado, konvinko, transdono de demanda decido al neinteresitaj prudentaj personoj. Tiel devas agi ankaŭ la popoloj de nia tempo. Tiuj ĉi rezonadoj ŝajnas tute pravaj. Popoloj de nia tempo jam ĝisvivis ĝis la periodo de prudento, ne havas malamikecon unu kontraŭ alian kaj povus solvi siajn malkonsentojn per paca maniero. Sed tiu ĉi rezonado estas prava nur rilate al popoloj, sole al popoloj, se ili ne estus sub la potenco de registaroj. La popoloj do, kiuj submetiĝas al registaroj, ne povas esti prudentaj, ĉar la submetiĝo al registaroj jam estas signo de grandega malprudento.

Ĉu oni povas paroli pri prudento, kiam homoj antaŭe promesas plenumi ĉion tion (inkluzivante tie ankaŭ la mortigadon al homoj), kion ordonos registaro, t. e. iuj okaze en tiu situacio-troviĝantaj homoj ?

La homoj, povantaj akcepti tian sindevigon de senmurmura submetiĝo al ĉio, kion al ili ordonos nekonataj al ili homoj el Peterburgo, Vieno, Parizo, ne povas esti prudentaj, kaj la registaroj, t. e. homoj, posedantaj tian potencon, ankoraŭ pli malmulte povas esti prudentaj kaj ne povas ne trouzadi ĝin, ne povas

ne frenezigi de tia senprudente terura potenco. Kaj tial ne povas esti atingita la paco inter popoloj per prudenta maniero, per konvencioj, arbitracioj tiel longe, kiel longe ekzistas la submetiĝo de popoloj al registaroj, kiu ĉiam estas neprudenta kaj ĉiam pereiga.

La submetiĝo de homoj al registaroj ekzistos tiom longe, kiom ekzistos patriotismo, ĉar ĉiu potenco baziĝas sur patriotismo, t. e. sur la pretô de homoj por defendo de sia popolo, patrujo, t. e. ŝtato kontraŭ la kvazaŭ minacantaj al ĝi danĝeroj submetiĝi al potenco.

Sur tiu patriotismo baziĝis la potenco de francaj reĝoj super sia popolo antaŭ la revolucio; sur tiu sama patriotismo baziĝis ankaŭ la potenco de komitato por socia sendanĝereco post la revolucio; sur tiu sama patriotismo fondiĝis la potenco de Napoleono (de konsulo kaj de imperiestro); kaj sur tiu sama patriotismo stariĝis post la eksigo de Napoleono la potenco de Burbonoj, kaj poste de respubliko, kaj de Ludoviko-Filipo, kaj denove de respubliko, kaj sur tiu sama patriotismo preskaŭ estus fondita la potenco de s-ro Bulanĵe.

Estas terure diri, ke estas kaj estis nenia komuna perforto de unuj homoj kontraŭ aliaj, kiu ne estus farata en nomo de patriotismo. En nomo de patriotismo la Rusoj militis kon-



traŭ Francoj, Francoj kontraŭ Rusoj, kaj en nomo de patriotismo nun preparas sin la Rusoj kun Francoj militi kontraŭ Germanoj, kaj en nomo de patriotismo la Germanoj nun preparas sin militi je du frontoj. Sed ne nur la militoj, — en nomo de patriotismo Rusoj sufokas Polojn kaj Germanoj Slavojn; en nomo de patriotismo la Komunanoj mortigis Versajanojn, kaj Versajanoj — Komunanojn.

## XV

Ŝajnus, ke kun la disvastiĝo de klero, de plifaciligitaj rimedoj de komunikiĝo, de oftaj interrilatoj inter diversnaciaj homoj, ĉe la disvastiĝo de gazetaro kaj, ĉefe, ĉe tuta malapero de danĝero flanke de aliaj popoloj, la trompo de patriotismo devus fariĝi pli kaj pli malfacila kaj fine fariĝi malebla.

Sed la sekreto konsistas en tio, ke tiuj samaj rimedoj de ĝenerala klerigo, de plifaciligitaj komunikiĝrimedoj kaj interrilatoj, kaj ĉefe gazetaro, ekkaptitaj kaj ĉiam pli kaj pli ekkaptataj de registaroj, donas al ili tian eblon eksciti en popoloj la reciprokajn malamikajn sentojn, ke kiom pligrandiĝadis la evidento de nebezono kaj de malutilo de patriotismo,

tiom pligrandiĝadis ankaŭ la forto de registaroj kaj de regantaj klasoj influadi la popolon por eksciti patriotismon.

La diferenco inter tio, kio estis kaj kio estas nun, konsistas nur en tio, ke ĉar nun la pli granda nombro da homoj partoprenas en tiuj profitoj, kiujn liveras la patriotismo al superaj klasoj, tiel ankaŭ la pli granda nombro da homoj partoprenas en la disvastigado kaj subtenado de tiu mirinda superstiĉo.

Ju pli malfacile estas konservi sian potencon, kun des pli kaj pli granda nombro da homoj la registaro dividas ĝin.

Antaŭe estradis malgranda amaseto da homoj : imperiestroj, reĝoj, dukoj, iliaj oficistoj kaj militistoj ; kaj nun partoprenantoj al tiu potenco kaj al per ĝi akirataj profitoj fariĝis ne nur administristoj kaj pastraro, sed ankaŭ grandaj kaj malgrandaj kapitalistoj, terposedantoj, bankistoj, parlamentanoj, instruistoj, vilaĝaj administrantoj, scienculoj kaj eĉ artistoj, kaj precipe verkistoj-ĵurnalistoj. Kaj ĉiuj tiuj personoj konscie aŭ nekonscie disvastigas la trompon de patriotismo, necesan al ili por konservi sian profitan situacion. Kaj la trompo dank'al tio, ke la rimedoj de trompo fariĝis pli fortaj kaj ke en ĝi partoprenas nun ĉiam pli granda nombro da homoj, estas farata tiel sukcese, ke malgraŭ la pli granda malfacilo de trompado, la grado de trompiĝo de l' popolo restas la sama.

Cent jarojn antaŭe la nelegopova popolo, havanta neniun komprenon pri tio, el kio konsistas ĝia registaro, kaj pri tio, kiaj popoloj ĝin ĉirkaŭas, blinde obeis al lokaj oficistoj kaj bienposedantoj, ĉe kiuj ĝi estis en sklaveco. Kaj al registaro sufiĉis per subaĉetoj kaj donacoj teni tiujn oficistojn kaj bienposedantojn en sia potenco, por ke la popolo obeeme plenumu tion, kion oni postulis de ĝi. Kaj nun, kiam la popolo plejparte jam povas legi, pli aŭ malpli scias, el kio konsistas ĝia registaro, kiaj popoloj ĉirkaŭas ĝin ; kiam homoj el popolo konstante kaj facile moviĝas de loko al loko, alportante al ĝi sciigojn pri tio, kio fariĝas en la mondo, jam estas nesufiĉa la simpla postulo plenumi ordonojn de registaroj : estas necese ankoraŭ malheligi tiujn verajn komprenojn pri vivo, kiujn havas popolo, inspiri al ĝi ne verajn komprenojn pri kondiĉoj de ĝia vivo kaj pri rilatoj al ĝi de aliaj popoloj.

Kaj jen dank'al disvastigo de gazetaro, de elementa klero kaj de facilo de komunikiĝoj, la registaroj, ĉie havantaj siajn agentojn, per ordonoj, preĝejaj predikoj, lernejoj, gazetoj inspiras al la popolo plej sovaĝajn kaj malverajn

komprenojn pri ĝiaj profitoj, pri la interrilatoj inter popoloj, pri iliaj ecoj kaj intencoj, kaj la popolo, tiom subpremata per laboro, ke ĝi havas nek tempon, nek eblon kompreni la signifon kaj ekzameni la juston de tiuj komprenoj, kiuj estas al ĝi inspirataj, kaj de tiuj postuloj, kiujn en nomo de ĝia bonstato oni prezentas al ĝi, senmurmure obeas al ili.

Kaj la homoj el popolo, liberiĝantaj de senhalta laboro kaj kleriĝantaj, kaj tial, ŝajnus, povantaj kompreni la trompon faratan al ili, estas submetataj al tia plifortigita influo de minacoj, subaĉeto kaj hipnotigado de registaroj, ke ili preskaŭ senescepte tuj transiras al la registaro, kaj akceptante la profitajn kaj bone pagatajn oficojn kiel instruistoj, pastroj, oficiroj, administrantoj, fariĝas partoprenantoj en disvastigado de tiu trompo, kiu pereigas iliajn kunfratojn. Kvazaŭ en la pordoj de kleriĝo troviĝas retoj, en kiujn neeviteble enfalas ĉiuj, kiuj per tiuj aŭ aliaj rimedoj eliras el la per laboro absorbata popolamaso.

Komence, kiam oni ekkomprenas la tutan kruelon de tiu trompo, nevole leviĝas la indigno kontraŭ tiuj, kiuj pro siaj personaj, egoistaj, vantaj profitoj faras tiun kruelan, pereigantan ne nur korpon, sed ankaŭ animon de homoj trompadon, kaj oni volas kulpigi tiujn kruelajn



trompantojn. Sed la afero estas ja jena, ke la trompantoj trompas ne tial, ke ili volas trompi, sed tial, ke ili preskaŭ ne povas fari aliel. Kaj trompas ili ne makiavele, ne kun la konscio de farata de ili trompo, sed plejparte kun naiva konvinko, ke ili faras ion bonan kaj altan, en kio ilin konstante subtenas la kunsento kaj aprobo de ĉiuj ĉirkaŭantaj ilin. Vere, malklare sentante, ke sur tiu trompo baziĝas ilia potenco kaj profita situacio, ili nevole estas allogataj de ĝi, sed agas ili ne tial, ke ili volas trompi la popolon, sed tial, ke ili pensas, ke la farata de ili afero estas utila por la popolo.

Tiel la imperiestroj, reĝoj kun siaj ministroj, farante siajn kronadojn, manovrojn, paradojn, vizitojn unu al alia, dum kiuj ili, vestigante sin en diversajn uniformojn, transveturante de loko al loko, kun seriozaj vizaĝoj konsiliĝas unu kun alia pri tio, kiel pacigi kvazaŭ malpacantajn popolojn (al kiuj neniam eĉ en kapon venos ekmiliti unu kontraŭ alia), estas tute konvinkitaj, ke ĉio tio, kion ili faras, estas afero tre prudenta kaj utila.

Tiel same ankaŭ ĉiuj ministroj, diplomatoj kaj diversaj oficistoj, ornamante sin per siaj uniformoj kun diversaj rubandetoj kaj krucetoj, kaj zorgeme skribantaj sur belega papero je

numeroj siajn malklarajn, konfuzajn, al neniu necesajn sciigojn, raportojn, ordonojn, projektojn, estas tute konvinkitaj, ke sen tia ilia agado ekhaltos aŭ malordiĝos la tuta vivo de l' popoloj.

Tiel same ankaŭ la militistoj, ornamitaj en siaj ridindaj vestaĵoj, serioze rezonantaj pri tio, per kiaj pafiloj aŭ pafilegoj estas pli bone mortigadi homojn, estas tute konvinkitaj, ke iliaj manovroj kaj paradoj estas plej gravaj kaj necesaj aferoj por la popolo.

Je tio sama estas konvinkitaj ankaŭ la patriotismon predikantaj pastroj, ĵurnalistoj kaj verkistoj de patriotaj versoj kaj lernolibroj, ricevantaj por tio malavaran rekompencon. Tion saman ne pridubas ankaŭ la organizantoj de festoj laŭ speco de franco-rusaj, sincere kortuŝataj ĉe eldiro de siaj patriotaj paroladoj kaj tostoj. Ĉiuj homoj faras tion, kion ili faras, senkonscie, ĉar tio estas necesa aŭ ĉar sur tiu trompo baziĝas ilia tuta vivo, kaj tial, ke ili ne scias fari ion alian, kaj dume tiuj samaj iliaj agoj trovas kunsenton kaj aprobon de ĉiuj ĉi homoj, inter kiuj ili estas farataj. Sed ne sufiĉe, ke, estante ligataj unu kun alia, ili mem aprobas kaj pravigas la konduton kaj agadon unu de alia: imperiestroj kaj reĝoj — de militistoj, ocfiistoj kaj de pastraro, kaj la militistoj, oficistoj



kaj pastraro — de imperiestroj kaj reĝoj kaj unu de alia; la popolamaso, precipe urba, ne vidante ian por ili komprenatan sencon en ĉio tio, kio estas farata de tiuj homoj, nevole aljuĝas al ili precipan, preskaŭ supernaturan signifon. La popolamaso vidas, ekzemple, ke oni starigas triumfajn pordojn, la homoj ornamas sin per kronoj, uniformoj, talaroj, oni bruligas fajraĵojn, pafadas el pafilegoj, sonorigas sonorilojn, kun muziko marŝas regimentoj, flugas paperoj kaj telegramoj kaj la senditoj de loko al loko, kaj la strange ornamiĝintaj homoj senhalte zorge transveturas de loko al loko, ion parolas kaj skribas ktp., kaj la popolamaso, ne estante en la stato ekzameni, ke ĉio ĉi estas farata (kiel tio estas fakte) sen plej malgranda neceso, alskribas al ĉio tio precipan, misteran por ĝi kaj gravan signifon, kaj per krioj de ravo aŭ per silenta estimo renkontas ĉiujn tiujn vidaĵojn. Kaj dume tiuj elmontroj de ravo kaj ĉiam de estimo ankoraŭ plifortigas la konvinkon de tiuj homoj, kiuj faras ĉiujn ĉi malsaĝaĵojn.

# XVI

Jam delonge la potenco de registaroj super la popoloj tenas sin ne per forto, kiel ĝi tenis sin en tiuj tempoj, kiam unu nacio konkeradis alian kaj per forto de armiloj tenis ĝin en obeemo, aŭ kiam la estraroj inter la senarma popolo havis apartajn armitajn bandojn el janiĉaroj (Turkio), opriĉnikoj (Rusio), gvardianoj. La potenco de registaroj jam delonge tenas sin nur per tio, kio estas nomata ĝenerala opinio.

Ekzistas la ĝenerala opinio, ke patriotismo estas granda morala sento, kaj ke estas bone kaj oni devas konsideri sian popolon, sian ŝtaton kiel la plej bonan en la mondo, kaj disvolviĝas nature el tio elfluanta ĝenerala opinio, ke estas bone kaj oni devas agnoski en si la potencon de registaroj kaj submetiĝi al ĝi, ke estas bone kaj oni devas servi kiel militisto kaj submetiĝi al disciplino, bone kaj necese sub formo de impostoj doni al registaro siajn ŝparaĵojn, bone kaj necese submetiĝi al decidoj de juĝejoj, estas bone kaj necese senkontrole kredi al tio, kio de regantaj personoj estas prezentata kiel dia vero.



Kaj se ekzistas tiu ĝenerala opinio, stariĝas fortega potenco, posedanta en nia tempo miliardojn da mono, organizitan mekanismon de administrado, poŝtojn, telegrafojn, telefonojn, disciplinitajn armeojn, juĝejojn, policon, obeeman pastraron, lernejon, eĉ gazetaron, kaj tiu potenco subtenas en popoloj tiun ĝeneralan opinion, kiu estas al ĝi necesa.

La potenco de registaroj baziĝas sur la ĝenerala opinio; posedante potencon, la registaroj per ĉiuj siaj organoj, oficistoj, juĝejoj, lernejoj, preĝejoj, eĉ gazetaro, ĉiam povas subteni tiun ĝeneralan opinion, kiu al ili estas necesa. La ĝenerala opinio kreas potencon; potenco kreas ĝeneralan opinion: kaj ŝajnas, ke ekzistas neniu eliro el tiu situacio.

Kaj tiel estus fakte, se la ĝenerala opinio estus io konstanta, neŝanĝebla, kaj se la registaroj povus produkti tiun ĝeneralan opinion, kiu al ili estas necesa.

Sed feliĉe tiel ne estas, kaj la ĝenerala opinio estas, unue, ne io konstanta, ne ŝanĝiĝanta, staranta, sed, kontraŭe, io konstante ŝanĝiĝanta, moviĝanta kun la moviĝo de homaro; kaj due, la ĝenerala opinio ne nur ne povas esti produktata laŭ deziro de registaro, sed mem estas tio, kio produktas registarojn kaj donas al ili potencon aŭ deprenas ĝin de ili.

Se eĉ povas ŝajni, ke la ĝenerala opinio restas senmova kaj nun estas tia, kia ĝi estis antaŭ dekoj da jaroj, kaj eĉ povas ŝajni, ke la ĝenerala opinio rilate al kelkaj apartaj okazoj ŝanceliĝas, kvazaŭ returniĝante, tiel ke ĝi ekzemple nun forigas respublikon, ŝanĝante ĝin je monarkio, aŭ denove forigas monarkion, ŝanĝante ĝin je respubliko; sed tio nur ŝajnas tiel, kiam ni rigardas la eksterajn elmontrojn de tiu ĝenerala opinio, kiu estas artifike produktata de registaroj. Sed oni bezonas nur preni la ĝeneralan opinion rilate al tuta vivo de homoj, kaj ni ekvidos, ke ĝenerala opinio tiel same, kiel tempo de tago aŭ de jaro, neniam staras sur unu loko, sed ĉiam moviĝas, ĉiam nedeflankiĝante iras antaŭen sur tiu sama vojo, sur kiu iras antaŭen la homaro, tiel same, kiel malgraŭ la malhelpoj kaj ŝanceliĝoj, nedeflankiĝante iras antaŭen tago aŭ printempo, sur tiu vojo, sur kiu iras la suno. Tiel, kvankam laŭ nur eksteraj signoj la situacio de l' popoloj de Eŭropo en nia tempo estas preskaŭ tiu sama, kia ĝi estis antaŭ 50 jaroj, la rilato de l' popoloj al ĝi estas jam tute alia ol antaŭ 50 jaroj. Se ekzistas tiaj samaj, kiel antaŭ 50 jaroj, potenculoj, armeoj, militoj, impostoj, lukso kaj malriĉego, katolikismo, ortodoksismo kaj luteranismo, do tio antaŭe ekzistis, ĉar



tion postulis ĝenerala opinio; kaj nun tio ekzistas nur tial ke registaroj artifike subtenas tion, kio antaŭe estis viva ĝenerala opinio.

Se ni ofte ne rimarkas tiun moviĝon de l' ĝenerala opinio, kiel ni ne rimarkas la fluon de akvo en rivero, laŭ la fludirekto de kiu ni naĝas, tio devenas de tio, ke tiuj nerimarkeblaj ŝanĝoj de ĝenerala opinio, kiuj faras ĝian movadon, okazas en ni mem.

La eco de ĝenerala opinio estas konstanta kaj nehaltigebla moviĝo. Se ŝajnas al ni, ke ĝi staras sur unu loko, tio devenas de tio, ke ĉie estas homoj konstruantaj al si oportunan situacion sur iu momento de ĝenerala opinio kaj tial per ĉiuj fortoj penantaj reteni ĝin kaj ne permesi elmontriĝi al tio nova, estanta, kio kvankam ankoraŭ ne elmontriĝis tute, sed jam vivas en la konscio de homoj. Kaj tiaj homoj, retenantaj la forvivintan ĝeneralan opinion kaj kaŝantaj novan, estas nun ĉiuj tiuj, el kiuj konsistas registaroj kaj regantaj klasoj, konfesantaj patriotismon kiel necesan kondiĉon de homa vivo.

La rimedoj, kiujn posedas tiuj homoj, estas grandegaj, sed ĉar la ĝenerala opinio estas io eterne fluanta kaj kreskanta, tiel ĉiuj iliaj penoj ne povas ne esti vanaj : la malnova maljuniĝas, la nova kreskas.

Ju pli longe estos malhelpata la elmontro de nova ĝenerala opinio, des pli ĝi elkreskos kaj kun des pli granda forto ĝi elmontriĝos. La registaroj kaj la regantaj klasoj per ĉiuj fortoj penas reteni tiun malnovan ĝeneralan opinion de patriotismo, sur kiu estas konstruita ilia potenco, kaj haltigi la elmontron de nova, kiu detruos ĝin. Sed reteni la malnovan kaj haltigi novan oni povas nur ĝis ia grado, tiel same, kiel nur ĝis ia limo oni povas per digo haltigi fluantan akvon.

Kiom ajn penadus la registaroj eksciti en popoloj la nepropran jam al ili ĝeneralan opinion de pasinto pri indo kaj heroeco de patriotismo, la homoj de nia tempo jam ne kredas je patriotismo, sed ĉiam pli kaj pli kredas je solidaro kaj frateco de popoloj. La patriotismo jam montras al homoj nenian krom plej teruran estonton; la frateco de l' popoloj estas tiu idealo, kiu ĉiam pli kaj pli fariĝas komprenebla kaj dezirinda al homaro. Kaj tial la transiro de l' homoj de antaŭa forvivinta ĝenerala opinio al nova neeviteble devas okazi. Tiu transiro estas tiel same neevitebla, kiel la defalo en printempo de lastaj sekiĝintaj folioj kaj disvolviĝo de junaj el ŝvelintaj burĝonoj.

Kaj ju pli oni forpuŝas tiun transiron, des



pli persista fariĝas ĝi, kaj des pli evidentiĝas ĝia neceso.

Kaj vere oni bezonas nur rememori, kion ni konfesas kiel kristanoj, kaj simple kiel homoj de nia tempo, rememori tiujn moralajn principojn, per kiuj ni estas gvidataj en nia socia, familia kaj persona vivo, kaj tiun situacion, en kiun ni starigis nin en nomo de patriotismo, por ekvidi ĝis kia grado de kontraŭdiro ni alvenis inter nia konscio kaj tio, kio dank' al plifortigita influo de registaro en tiu direkto estas nia ĝenerala opinio. Oni bezonas nur pripensi tiujn kutimajn postulojn de patriotismo, kiuj, kiel io plej simpla kaj natura, estas prezentataj al ni, por ke oni povu ekkompreni, ĝis kiu grado tiuj postuloj kontraŭdiras al tiu vera ĝenerala opinio, kiun ni ĉiuj havas komune. Ni ĉiuj konsideras nin kiel liberajn, klerajn, humanajn homojn, eĉ kristanojn, kaj tamen ni ĉiuj troviĝas en tia situacio, ke... s-ro N. N. skribos spritan artikolon pri orienta demando, aŭ iu princo prirabos iajn Bulgarojn aŭ Serbojn, aŭ ia reĝedzino aŭ imperiestredzino ofendiĝos je io, kaj ni ĉiuj kleraj, humanaj kristanoj devas iri mortigi homojn, kiujn ni ne konas kaj al kiuj ni havas amikajn sentojn, kiel al ĉiuj homoj. Se tio ankoraŭ ne okazis, ni dankas tion, kiel

oni certigas nin, al la pacemo de Aleksandro III aŭ al tio, ke Nikolajo Aleksandroviĉ edziĝos je nevino de Viktoria. Kaj se sur loko de Aleksandro estus alia, aŭ se mem Aleksandro ŝanĝos sian humoron, aŭ se Nikolajo Aleksandroviĉ edziĝos je Amalia, sed ne je Aliso, ni kiel sangavidaj bestoj ĵetos nin por eligi la intestojn unu de l' alia. Tiela estas kvazaŭ la ĝenerala opinio de l' nuna tempo. Tiaj rezonadoj trankvile estas ripetataj en ĉiuj plej progresemaj kaj liberalaj organoj de l' gazetaro.

Se ni, miljaraj kristanoj, ankoraŭ ne distranĉis gorĝon unu de alia, tio estas nur tial ke Aleksandro III ne permesas fari tion.

Tio estas ja terura!

## XVII

Por tio, ke efektiviĝu la plej grandaj kaj gravaj ŝanĝoj en homara vivo, estas necesaj neniaj heroaĵoj: nek armado de milionoj da militistoj, nek konstruado de novaj vojoj kaj maŝinoj, nek organizado de ekspozicioj, nek organizado de unuiĝoj inter laboristoj, nek revolucioj, nek barikadoj, nek eksplodoj, nek eltrovo de aeronaĝado ktp., sed estas necesa nur ŝanĝo de ĝenerala opinio. Kaj por ŝanĝi



la ĝeneralan opinion estas necesaj neniaj penadoj de penso, nek estas necese renversi ion ajn ekzistantan kaj elpensi ion ajn eksterordinaran, novan, sed estas necese nur ne submetiĝi al mensoga, jam mortinta, artifike ekscitata de registaroj ĝenerala opinio de pasinto, estas nur necese, ke ĉiu aparta homo parolu tion, kion li vere pensas kaj sentas, aŭ ke almenaŭ li ne parolu tion, kion li ne pensas. Kaj se nur homoj, almenaŭ malgranda nombro da homoj, farus tion, tuj mem per si falos la forvivinta ĝenerala opinio kaj montriĝos juna, viva, estanta. Kiam ŝanĝiĝos la ĝenerala opinio, sen ia penado per si mem ŝanĝiĝos tiu interna strukturo de homa vivo, kiu premas kaj turmentas nin. Estas honto diri, kiom malmulte estas necesa, por ke ĉiuj homoj liberiĝu de ĉiuj tiuj mizeroj, kiuj nun turmentas ilin: estas necese nur ne mensogi. Nur ne submetiĝu homoj al tiu mensogo, kiun oni inspiras al ili, ne diru nur tion, kion ili ne pensas kaj ne sentas, kaj efektiviĝos tia renverso en tuta ordo de nia vivo, kiun ne atingos revoluciuloj en jarcentoj, se eĉ ili havus tutan potencon en siaj manoj.

Se nur la homoj kredus, ke la forto estas ne en forto, sed en vero, kaj se ili kuraĝe eldiradus ĝin aŭ almenaŭ se nur ne deflankiĝ-

adus de ĝi per vorto aŭ faro : ne dirus tion, kion ili ne pensas, ne farus tion, kion ili konsideras malbona kaj malsaĝa.

Kia do gravaĵo krii : « Vivu Francio ! » aŭ « hura ! » al iu imperiestro, reĝo, venkinto, iri, vestiĝinte en uniformon, kaj alpendiginte kortegan ŝlosilon, atendi lin en antaŭĉambro, riverenci kaj nomi lin per strangaj titoloj kaj poste inspiri al ĉiuj junaj kaj nekleraj homoj, ke tion fari estas tre laŭdinde ? Aŭ kia gravaĵo, skribi artikolon por defendo de franco-rusa alianco, aŭ de dogana milito, aŭ por kulpigo al Germanoj, Rusoj, Francoj, Angloj ? Aŭ kia gravaĵo, iri al iu ajn patriota festeno kaj trinki je la sano kaj paroli laŭdajn paroladojn al homoj, kiujn vi ne amas kaj je kiuj vi havas nenian intereson ? Aŭ eĉ kia gravaĵo, en interparolo konsenti pri bonfaro kaj utilo de traktatoj, unuiĝoj aŭ eĉ trasilenti, kiam ĉe vi oni laŭdas sian popolon kaj ŝtaton, insultas kaj mallaŭdas aliajn popolojn, aŭ kiam oni laŭdegas katolikismon, ortodoksismon, luteranismon aŭ iun ajn heroon de milito aŭ reganton laŭ speco de Napoleono, Petro aŭ de nuntempa Bulanĵe, Skobelev ?

Ĉio ĉi ŝajnas tiel negrava. Kaj fakte en tiuj ĉi ŝajnantaj al ni negravaj kondutoj, en nia rezigno je partopreno en ili, en la montro



laŭ niaj fortoj de neprudento de tio, kies neprudento estas al ni evidenta, en tio konsistas nia grandega, nekontraŭstarebla potenco, tio, el kio kunmetiĝas tiu nevenkebla forto, kiu faras la veran nunan ĝeneralan opinion, tiun opinion, kiu, mem moviĝante, movas la tutan homaron. La registaroj konas tion kaj tremas antaŭ tiu forto, kaj per ĉiuj de ili dependantaj rimedoj penas kontraŭagi aŭ ekestri ĝin.

Ili scias, ke forto estas ne en forto, sed en penso kaj en klara ĝia esprimo, kaj tial ili timas la esprimon de sendependa penso pli ol armeojn ; ili organizas cenzurojn, subaĉetas gazetojn, perfortprenas la estradon super religioj, super lernejoj. Sed tiu spirita forto, kiu movas la mondon, forglitiĝas de ili ; ĝi estas eĉ ne en libro, ne en gazeto ; ĝi estas nekaptebla kaj ĉiam libera ; ĝi estas en la profundo de l' homa konscio. La plej potenca kaj ne kaptebla, libera tiu ĉi forto estas tiu, kiu montriĝas en homa animo, kiam li sola mem kun si pripensas la fenomenojn de l' mondo kaj poste nevole elparolas siajn pensojn al sia edzino, frato, amiko, al ĉiuj tiuj homoj, kun kiuj li interrilatas kaj rilate al kiuj kaŝi tion, kion li konsideras kiel veron, li kalkulus al si kiel pekon. Neniaj miliardoj da rubloj, milionoj da militistoj kaj neniaj institucioj, nek

militoj, nek revolucioj povas efiki tion, kion povas efiki simpla esprimo de libera homo pri tio, kion li konsideras justa sendepende de tio, kio ekzistas kaj kio estas inspirita al li.

Unu libera homo diros vere tion, kion li pensas kaj sentas, inter miloj da homoj, per siaj konduto kaj vortoj asertantaj tute kontraŭon. Ŝajnus, ke tiu, kiu sincere eldiris sian penson, devas resti sola, kaj dume plejparte estas tiel, ke ĉiuj aŭ pliparto jam delonge pensas aŭ sentas tion saman, nur ne eldiras ĝin. Kaj tio, kio hieraŭ estis nova opinio de unu homo, fariĝas hodiaŭ ĝenerala opinio de pliparto. Kaj ĵus ekregis tiu ĉi opinio, tuj nerimarkeble, iom post iom, sed nehaltigeble komencas ŝanĝiĝi la konduto de l' homoj.

Kaj nun ĉiu libera homo diras al si : « Kion mi povas fari kontraŭ tuta tiu maro el malbono kaj trompo, superakviganta nin ? Kiacele eldiri sian opinion ? Kiacele eĉ krei ĝin ? Estas pli bone ne pensi pri tiuj neklaraj kaj konfuzaj demandoj. Eble tiuj kontraŭdiroj estas neevitebla kondiĉo de ĉiuj fenomenoj en vivo. Kiacele mi sola batalus kontraŭ tuta malbono de l' mondo ? Ĉu ne estas pli bone sindoni al la fortrenanta nin ondo : se eĉ estas eble fari ion ajn, tiam ne al sola, sed en asocio kun aliaj homoj. » Kaj flankenlasante tiun potencan ilon de penso kaj de ĝia esprimo, kiu movas mondon, ĉiu prenas ilon de socia agado, ne rimarkante tion, ke ĉia socia agado fondiĝas sur tiuj samaj principoj, kontraŭ kiuj li devas batali ; ke ekokupante sin per socia agado en nia mondo, ĉiu homo devas almenaŭ parte deflankiĝi de vero, fari tiajn cedojn, per kiuj li nuligas la tutan forton de tiu potenca batalilo, kiu estas donita al li. Simile kiel la homo, al kiu estas donita en la manojn tranĉega klingo, ĉion distranĉanta, ekkomencus per tranĉrando enbatadi najlojn.

Ni ĉiuj plendegas pri freneza, kontraŭa al tuta nia estaĵo vivordo, kaj dume ne nur ne uzas tiun solan troviĝantan en nia potenco fortegan ilon de verkonscio kaj de ĝia esprimo, sed, kontraŭe, sub la motivo de batalo kontraŭ malbono, ni detruas tiun ilon kaj oferas ĝin al imagita batalo kontraŭ tiu ordo.

Unu ne eldiras tiun veron, kiun li scias, ĉar li sentas sin ŝulda al tiuj homoj, kun kiuj li estas ligita ; alia — ĉar la vero povus lin senigi de tiu profita situacio, per kiu li subtenas sian familion ; tria — ĉar li volas atingi gloron kaj potencon kaj poste uzi ilin por servado al homoj ; kvara — ĉar li ne volas forigi la malnovajn sanktajn tradiciojn ; kvina — ĉar li ne volas ofendi homojn ; sesa — ĉar

la eldirado de vero elvokas persekutadon kaj ekdetruos tiun bonan socian agadon, per kiu li okupas sin aŭ intencas okupiĝi...

Unu servas kiel imperiestro, reĝo, ministro, oficisto, militisto, kaj certigas sin kaj aliajn, ke tiu deflankiĝo de vero, kiu estas necesa ĉe lia situacio, estas riĉe elaĉetata per alportata de li utilo. Alia plenumas taskojn de spirita paŝtisto, en profundo de animo ne kredante je ĉio tio, kion li predikas, sed permesas al si deflankiĝi de vero konsiderante la alportatan de li utilon. Tria instruas homojn per literaturo kaj malgraŭ la necesa prisilento de l' tuta vero por ne starigi kontraŭ si registarojn kaj socion, ne dubas pri la alportata de li utilo. Kvara rekte batalas kontraŭ ekzistanta ordo, kiel revoluciuloj, anarkistoj, kaj estas tute konvinkita, ke la celo, kiun li volas atingi, estas tiel bonfara, ke la necesa por sukceso de sia agado prisilento de l' vero kaj eĉ mensogo ne nuligas la bonfaremon de sia agado.

Por ke ŝanĝiĝu la kontraŭa al konscio de homoj vivordo kaj anstataŭiĝu per responda al ĝi, estas necese, ke la forvivinta ĝenerala opinio estu anstataŭigata per viva, nova.

Kaj por ke la malnova, forvivinta ĝenerala opinio cedu lokon al nova, viva, estas necese, ke homoj, komprenantaj novajn postulojn de



l' vivo, malkaŝe eldiradu ilin. Kaj dume ĉiuj homoj, komprenantaj ĉiujn tiujn novajn postulojn, unu en nomo de unu, alia en nomo de alia, ne nur prisilentas ilin, sed per vortoj kaj faroj asertas tion, kio estas rekte kontraŭa al tiuj ĉi postuloj. Nur la vero kaj ĝia esprimado povas starigi tiun novan ĝeneralan opinion, kiu ŝanĝos la malantaŭrestintan kaj malutilan vivordon, kaj dume ni ne nur ne eldiradas tiun veron, kiun ni scias, sed ofte eĉ rekte eldiras tion, kion ni mem konsideras malvera.

Se nur la liberaj homoj ne konfidus al tio, kio ne havas forton kaj ĉiam estas mallibera, — al ekstera potenco, sed konfidus al tio, kio estas ĉiam potenca kaj libera, — al vero kaj ĝia esprimado. Se ili nur kuraĝe kaj klare eldiradus jam malkaŝiĝintan al ili veron pri frateco de ĉiuj popoloj kaj pri krimo de ekskluziva sindono al siaj popoloj, mem per si desaltus, kiel sekiĝinta felo, tiu morta mensoga ĝenerala opinio, sur kiu apogas sin la tuta potenco de registaroj kaj tuta malbono, kiun ili kaŭzas, kaj ekmontriĝus tiu nova, viva ĝenerala opinio, kiu atendas nur la malaperon de malhelpanta ĝin malnova vivo por povi malkaŝe kaj potence anonci siajn postulojn kaj starigi konformajn al konscio de homoj novajn formojn de vivo.

# XVIII

Estas necese al homoj nur ekkompreni, ke tio, kion oni prezentas kiel ĝeneralan opinion, kion oni subtenas per tiaj malsimplaj, streĉitaj kaj artifikaj rimedoj, ne estas ĝenerala opinio, sed nur morta postsigno de iam estinta ĝenerala opinio; estas necese ĉefe konfidi al si, ke tio, kion oni konscias en profundo de sia animo, kio petegas ĉe ĉiu esti eldirata kaj ne estas eldirata nur tial, ke ĝi kontraŭas la ekzistantan ĝeneralan opinion estas tiu forto, kiu ŝanĝas la mondon kaj kies elmontro faras la alvokon, destinon de homo; estas necese al homoj nur ekkredi je tio, ke la vero estas ne tio, kion diras publike homoj, sed tio, kion diras al homo lia konscienco, t. e. Dio, kaj momente malaperos la mensoga, artifike subtenata ĝenerala opinio kaj ekregos la vera.

Se nur la homoj parolus tion, kion ili pensas, kaj ne parolus tion, kion ili ne pensas, tuj defalus ĉiuj superstiĉoj elfluantaj el patriotismo, kaj ĉiuj malbonaj sentoj kaj perfortoj, fonditaj sur ĝi. Defalus la de registaroj disblovata malamo kaj malpacado inter ŝtatoj kaj popoloj; defalus la laŭdegadoj al militaj



heroaĵoj, t. e. mortigoj; defalus, ĉefe, la estimado al estraroj, la fordonado al ili de siaj laborfruktoj kaj submetiĝo al ili, por kiuj krom patriotismo estas neniaj fundamentoj.

Kaj se nur fariĝus tio, kaj momente la tuta tiu grandega amaso da malfortaj, ĉiam de ekstere regataj homoj momente transiros al la flanko de nova ĝenerala opinio. Kaj la nova ĝenerala opinio fariĝos reganta anstataŭ malnova.

Lasu ni al registaroj posedi lernejon, preĝejon, gazetaron, miliardojn da rubloj kaj milionojn da disciplinitaj, ŝanĝitaj en maŝinojn homoj — la tuta tiu ĉi laŭŝajne terura organizo de maldelikata forto estas nenio antaŭ la konscio de vero, estiĝanta en animo de komprenanta forton de vero unu homo kaj de tiu homo komunikiĝanta al dua, tria, kiel unu kandelo ekbruligas senfinan nombron da aliaj. Estas necese nur ekflamiĝi al tiu lumo, kaj kiel vakso antaŭ vizaĝo de fajro disfalos, degelos la tuta tiu ĉi tiel potence ŝajnanta organizo.

Se nur la homoj komprenus tiun teruran potencon, kiu estas donita al ili en vorto, esprimanta veron. Se nur la homoj ne vendus sian unuanaskitecon por la lenta manĝaĉo. Se nur la homoj uzadus tiun sian potencon, ne nur ne ekkuraĝiĝus la regantoj kiel nun minaci

per komuna buĉado, en kiun ili laŭ sia arbitro metos aŭ ne metos homojn, — ne ekkuraĝus ili antaŭ la okuloj de pacaj loĝantoj fari siajn paradojn kaj manovrojn de disciplinitaj mortigistoj, ne ekkuraĝus la registaroj por siaj kalkuloj, je la profito de siaj helpantoj organizi kaj disorganizi la doganajn kontraktojn, ne ekkuraĝus ankaŭ kolekti de popolo tiujn milionojn da rubloj, kiujn ili disdonadas al siaj helpantoj kaj sur kiuj ili prepariĝas al mortigado.

Sekve ŝanĝo estas ne nur ebla, sed estas neeble, ke ĝi ne fariĝu, estas tiel same neeble, kiel neeble, ke ne putriĝu kaj disfalu la forvivinta morta arbo kaj ne elkresku juna.

*Pacon mi lasas al vi, mian pacon donas al vi : ne malĝoju via koro kaj ne ektimu,* diris Kristo. Kaj tiu paco vere estas jam meze de ni, kaj de ni dependas akiri ĝin.

Nur ne malkuraĝiĝu la koro de apartaj homoj pro tiuj tentoj, per kiuj oni ĉiuhore tentas ilin, kaj ne ektimu tiujn imagajn timindaĵojn, per kiuj oni timigas ilin. Se nur scius la homoj, en kio konsistas ilia potencega, ĉionvenkanta forto, la paco, kiun ĉiam volis homoj, ne tiu, kiu estas akirata per diplomataj traktatoj, transveturoj de imperiestroj kaj reĝoj el unu urbo en alian, per tagmanĝoj, parol-



adoj, fortikaĵoj, pafilegoj, dinamitoj kaj melinitoj, ne per mizerigo de popolo per impostoj, ne per forŝiro de la floro el loĝantoj de la laboro kaj per ĝia malmoraligo, sed tiu paco, kiu estas akirata per libera konfeso de vero de ĉiu aparta homo, estus jam delonge inter ni.

*Moskvo, la 17-an de marto 1894.*

L. TOLSTOJ.

# ALDONO DE LA TRADUKINTO

En supra verko la profunda konsekvenca pensulo pruvas, ke estas neeble revi pri starigo de paca ordo tiel longe, kiel ni adorados patriotismon-naciismon. Liaj pensoj, kiel kutime ĉe geniuloj, antaŭrapidis kelkajn jardekojn aŭ -centojn. Li ekkonis la kaŭzon de malbono, penegas pruvi neceson radikale forigi ĝin, montras la irotan vojon, sed pri necesa por tio rimedo li ne parolas. Eble li tiam ankoraŭ ne konis ĝin. Tiun rimedon donacis al ni alia geniulo el Oriento — kreinto de esperanto. Ĉiuj penadoj interfratigi popolojn, starigi mondan ŝtatfederacion, ĉiuj kosmopolitaj revoj devis resti senfruktaj tiel longe, kiel mankis al la homaro la ilo, kiu kunigas homojn — mankis la komuna lingvo.

Nun ni konas la celon kaj la vojon al ĝi; en esperanto ni posedas por tio certan ilon, kaj espereble post la milito la por paco batalanta armeo kolose kreskos. Tial kuraĝe kaj senkompromise batalu ni por pli prudenta, feliĉa kaj hominda estonto! En tiu batalo ni ne restos solaj: kiel diris iu socialista parlamentano, post la milito milionoj donos al si solenan promeson labori, por ke ne ripetiĝu tiu malhonora, terura malfeliĉo.

Ke la ideoj de Tolstoj trovas anojn en la nuna mondo, pruvas eltiro el jena responda letero de homarano al pia naciisto:

Ke internaciigi ne estas samvalora al sennaciigi mi komprenas, kaj laŭ mia opinio ne esperanto devigos la naciojn forĵeti siajn lingvojn, sed la propra spirita profito de popoloj instigos ilin al tio.

Kial vi pensas, ke Dio volas, ke estu nacioj? Adamo kaj Evo certe estis nek Hebreoj nek Germanoj. Kaj longajn jarcentojn ĝis la babela fieriĝo homoj estis simple homoj. La estiĝon de nacioj Biblio prezentas al ni kiel Dian punon pro homaj pekoj. Ĉu Dio povas voli punon, mizeron? Ne, Dio ĉesus esti Dio, se Li volus tion, Li estas ja Bono mem. Ni mem punas nin per niaj pekoj, puno estas konsekvenco de peko, kaj la homo penas liberiĝi de pekoj certe ne tiacele por esti punata. Estus ja frenezulo, kiu ne penadus liberiĝi de propekaj punoj, kiel malsanoj, mizeroj, morto, infero. Kial ne peni liberiĝi de peko — nacia fiero, kaj de ĝia puno — naciismo?

Vi skribas, ke « ne ekzistas *nura arto*; same kiel ankaŭ ne ekzistas *pura homo*. » Certe la kompreno « arto » aŭ « homo » ĉiam estas realigata individue, ĉiu individuo havas ecojn, kiuj lasas diferencigi ĝin de ceteraj. Sed homo ĉiam restas homo; li povas diferenci nur je malgravaj, eksteraj, de vivkondiĉoj, klimato, aĝo dependantaj ecoj: la diferenco estas nur rasa, sed ne arta. La homo naskiĝas ne kun difinita nacio, sed kun de gepatroj heredataj fizikaj ecoj, kiuj estas similaj al rasaj ecoj de liaj prauloj. Kaj tiuj heredataj ecoj ne estas absolutaj: post kelkaj generacioj negron aŭ Mongolon oni povas ŝanĝi en Eŭropanon kaj reen. Cetere rasaj, eksteraj diferencoj ĉiam ja restos, ĉar restos diferenco en klimato, vivkondiĉoj, okupo, ktp. Sed tio ne estas ja grava: inter anoj de unu nacio ni povas ja ankaŭ konstati plej grandan diverson de eksteraj ecoj, kio ne malhelpas, ke ili konsideru sin kiel unu popolon. Grava estas nur, ke ni denove faru unu grandan homan familion, ke ni parolu unu lingvon (estas ja sensencaĵo, se unu familio havus multajn lingvojn). Kiom mi pripensadas tion, mi ne povas trovi iun logike motiveblan argumenton por konservo de naciaj lingvoj. La pastraro bedaŭrinde kaj malprofite por religio ĉiam tiel kon-



servativa kaj preskaŭ ne kapabla trovi novajn irotajn vojojn, diradas, defendante naciismon, ke Dio ne volas unuformecon. Certe Dio efektivigis multegajn kreitaĵ-eblojn, sed en tiu diverso Li konservis unuecon; aliel estus fariĝinta ĥaoso. Estas aĵoj, kiuj nepre devas esti unikaj, ekzemple, religio, moralo, rajto ktp. Al tiuj aĵoj apartenas ankaŭ lingvo, ĉar ĝia tasko konsistas ja en tio, ke ĝi estas ilo por interŝanĝo de pensoj, sentoj, kaj ĉar ĉiuj homoj estas kapablaj al pensoj kaj sentoj, tiu ilo devas esti komuna al ĉiuj. Tion ja komprenas ĉiu esperantisto. Sed strange, multaj el ili rezonadas jene: certe, ilo elpensita de d-ro Zamenhof estas bonega kaj taŭgas por ĉio, ni tamen aplikados tiun universalan por ĉio taŭgan ilon nur de tempo al tempo, plejparte tamen ni ludos kun nia nur loke taŭga ilo. Ĉu oni povus trovi tiel malprudentan terkulturiston, kiu kvankam posedus la plej modernajn maŝinojn, de tempo al tempo laborus per primitivaj antikvaj iloj nur tial, ke liaj prapatroj laboris per ili? Oni devas ja konstati tiun bedaŭrindan fakton, ke nuntempaj homoj anstataŭ lasi lingvon servi al si, mem fariĝis servantoj al lingvo. Dum lastaj jarcentoj lukse ekfloris kulto de propra nacia lingvo, kaj oni devas konsenti, ke ni nur duone estas kristanoj,

kaj ke krom Kristo ni adoras ne oran bovidon, sed ne pli racian idolon — ilon, lingvon. Kaj ke ni vere ĝin adoras, eĉ pli multe ol Kriston, tion ne pridisputeble klare pruvas la nuna milito, kiam homoj malkonfesas la kristan amordonon, kaj la ligon per lingva komuneco konsideras kiel pli gravan ol komunecon de religio. Nuntempa homo, precipe pastraro, kompreneble hipokrite ne volas vidi tion.

Kiu metiisto, povante produktadi per unu maŝino tiel same multajn kaj bonajn aĵojn, kiel per kelke da ili, aĉetus du aŭ pli da ili? Se li tion tamen farus, li estus minimume malŝparema. Ĉu ne estas tia sama nepardonebla malŝparemo devigi niajn infanojn anstataŭ unu por ĉio sufiĉa lingvo studi du lingvojn? Kristo ja diris, ke eĉ por ĉiu nenecesa vorto ni devos doni kalkulon! Kaj due, kiacele krei nacian literaturon? Tio ja estus nepardonebla perdo de fortoj kaj mono!

Vi skribas, ke « ĉiam la naciaj okazintaĵoj kaj cirkonstancoj naskis literaturajn konsekvencojn ». Certe, sed estus ja estinta feliĉo por la homaro, se la pliparto el tiuj literaturaĵoj estus ne aperinta. Kaj se kelkaj el ili estas vere gravaj kaj bonaj, ili povas ja aperi en homara lingvo. Nun ni vidas, ekz., ke Usono havas aliajn interesojn, ol Anglio aŭ Aŭstralio,



kaj tamen tiuj diferencaj interesoj povas reflektiĝi en unulingva literaturo.

Vi skribas, ke « ĉiu homo nepre aperas en iu ajn formo, ekz., Germano, Franco, Ĉino ». Sed tio estas ja tute malvera. El infano, farante al ĝi nenian devigon, vi povas fari iun ajn nacianon. Mi petas vin pri konsilo, per kiu metodo aŭ instrumento (eble mikroskopo?) oni povas ekkoni la naciecon de kelkmonata infano? Eĉ kiam mia filineto estos plenaĝa, neniu Litovo povos ekkoni, ke ŝi devenas de litovaj gepatroj. Se mi ne estus dirinta, ke mi estas Litovo, vi nur povus konstati, ke mi ne estas Germano, ĉar mi parolas malbone germane, sed de kia nacieco mi estas, tion vi ne ekkonus per iaj ajn rimedoj. Ne, la homo naskiĝas simple kiel homo, kaj nur la eksteraj cirkonstancoj faras el li nacianon. Kaj se ni volas rajte opinii nin prudentaj kreaĵoj, ni devas penadi, ke sur la estontajn homidojn ne estu surmetataj la malbenitaj katenoj de naciismo. La homido, venanta en la mondon simple kiel homo, devas ankaŭ resti simple homo. For la dividilon, la idolon, la malpaciganton — naciismon! La homaro estas malsanega, ĝi verŝas sangon kiel preskaŭ en antaŭmorta agonio. Estus ja aĉa kuracisto, kiu penus nur haltigi sangon kaj por kelkaj minutoj havigi

pliboniĝon, lasante la esencon de malsano eĉ ne ektuŝita. Tiaj kuracistoj estus ni, penantaj interfratigi popolojn, sed lasantaj la kaŭzon de malpacadoj — naciismon. Vi diras, ke estas necese forigi ne drinkemon, sed trodrinkemon. Kaj tio donas, kiel konate, nenian rezulton. Des pli ĉe naciismo, kiu estas ja esence malsaĝaĵo. Ĉu povas homo samtempe adoradi malsaĝaĵon — naciismon kaj penadi starigi prudentan, pacan homarordon?

Vi skribas, ke «esperanto estas helplingvo». Certe, sed de ni ja dependas uzadi ĝin ĉiam aŭ nur kiel helpilon. Certe longan tempon, eble jarcentojn, por grandaj nacioj esperanto restos helplingvo. Sed tio ne malhelpos, ke malgrandaj popoloj pli frue forĵetos siajn lingvojn, ŝanĝante ilin je esperanto. Tion memori estas necese ankaŭ al grandnacianoj, por ke ili povu konsideri naciismon kiel historian fenomenon kaj donante al ĝi tempan kaj lokan servon, ĉiam memoru, ke estonto apartenas simple al homaro, kaj ke tial sole homaraj interesoj estas vere realaj kaj meritas postuli nian vivdediĉon je sia servo. Konsiderante tion, oni devus en naciaj lingvoj verki nur tion, kio havas nur lokan kaj tempan intereson; la verkisto, volanta, ke liaj pensoj estu legataj sur ĉiuj lokoj de l' terglobo kaj



dum multaj jarcentoj, nepre verku en esperanto. Vi eble diros, ke esperanto dum jarcentoj multe ŝanĝiĝos. Certe, sed naciaj lingvoj ankaŭ ŝanĝiĝas kaj neniu nuntempulo povas legi sian nacian literaturon, verkitan antaŭ mil jaroj, ne preparante sin por tio. Kaj ĉar esperanto estas nekompareble pli facila, ol iu ajn nacia lingvo, niaj posteuloj eĉ post multaj jarcentoj aŭ jarmiloj bezonos verŝajne ne pli grandan ŝlosilon ol Ĉefeĉ'an por facile kompreni niajn verkojn. Nur estu ni Homeroj aŭ Virgiloj, nur meritu ni esti legataj! Se en esperanto ni laŭdados nian naciismon, por niaj posteuloj ni certe estos ridindaj kaj ili estos sufiĉe prudentaj por lasi putriĝi niajn infanajn verketojn.

Ne, vi povas esti trankvila, esperanto devigos neniun ĉesi uzadi sian gepatran lingvon, — la naciaj lingvoj malaperos, ĉar ili fariĝos senutilaj, ĉar la propra intereso devigos homojn ŝpari sian tempon pli kaj pli.

Estis tempo, kiam homo havis interesojn nur en sia vilaĝo, komunumo, kaj tiam sufiĉis al li lia regiona dialekto; nun ĉiu homo havas interesojn en tuta ŝtato kaj li bezonas nacian, ŝtatan lingvon. Kvankam ekzistas ankoraŭ protektantoj al regionaj dialektoj, tamen tiuj lastaj rapide kiel malnecesaj malaperas, kaj

oni ne bezonas esti profeto por antaŭdiri plenegan venkon de unu vera nacia, ŝtata lingvo. Ni vivas en transira periodo : la ŝtato ne sufiĉas jam por ni, ĉiam pli kaj pli multaj homoj ekhavas interesojn en tuta mondo, la scenejo de vivagado de venontaj generacioj estos la tuta mondo. Kaj kiel antaŭ la ŝtata lingvo malaperas pro sia senutileco regionaj dialektoj, tiel antaŭ la monda lingvo ankaŭ pro sia senutileco malaperos la naciaj lingvoj. Vi eble diros, ke regionaj dialektoj estas specoj de nacia lingvo kaj tial ili povas facile droni en maro de samnacia lingvo. Certe, sed ĉu niaj naciaj lingvoj ne estas specoj de nia prapatra aria lingvo, kaj ĉu esperanto ne entenas la ĉefajn trajtojn de niaj naciaj lingvoj ? Se niaj prapatroj, forlasinte lokon de antaŭa komuna loĝado kaj disirintaj en diversajn landojn, preskaŭ ne havante plu iun komunikiĝon kun siaj fratoj, iom post iom malproksimiĝis ankaŭ en lingvo unu de alia, ĉu ne estas devo de ni, iliaj idoj, forigi el niaj lingvoj apartaĵojn kaj denove paroli unu lingvon ? Nian komunikiĝon ja malhelpas jam nek montoj, nek maroj, kaj por ni estas nenia racia pravigo de nia multlingveco. Kial kontraŭstari al tempofluo ? La neprudenta homa kontraŭstaro kontraŭ la en pli fortaj manoj de Eternulo disvolviĝanta



historia evoluo povas ja kompreneble signifi nenion. Se ni ne volas simili Don Kiĥotojn, se ni volas uzi niajn fortojn por io, kio havas eternan valoron, ni ne devas kiel miopaj naciistoj okupadi nin per ne nur malsaĝa, sed evidente malutila dancrondo ĉirkaŭ la idolaĉo, konsistanta el diversaj naciaj ĉifonaĵoj, sed devas penadi malfermi la okulojn al niaj kunfratoj por venontaj, havantan daŭran valoron aferoj.

La naciisto, legante la supron, verŝajne ekpensos, ke se malaperos naciismo, la mondo devos prezenti unutonan bildon, ke restos nenio, por kio la homo povus entuziasmiĝi, por kio li ĝoje oferus sian vivon, same kiel por militemulo la starigo de pacordo ŝajnas preskaŭ samvalora al morto de homara vivo. Estas kompreneble, ke por homo, komprenanta la vivon nur kiel elmontron de fizika forto, la forigo de eblo elmontri tiun fizikan forton en detruado, devas ekŝajni kvazaŭ morto de l'homaro. Kaj la starigo de paca ordo vere kaŭzos morton, morton ne de l' homaro, sed de kulto de fizika detruanta forto, de milita kulto. Sed sur loko de tiu mortinta kulto de detruado elkreskos kulto de kreemo. Tiuj milionoj da homoj kaj miliardoj da mono, kies utilon por la homaro oni ne nur ne povas egaligi al nulo,

sed kies efikon oni devas konsideri kiel plej malutilan por la homa speco, dum paca ordo estos utiligataj por produktado de aĵoj, necesaj por igi vivinda nian vivon. Homara bonstato kreskos rapide, ĉiuj homoj ekhavos tempon por spiritaj interesoj. Ĉu tio estos morto de l' homaro?

Kaj la forigo de l' naciismo ne nur liberigos nin de multaj militkaŭzoj kaj ebligos veran kristanan amon, sed liberigos ankaŭ de neprodukta malŝparado de spiritaj fortoj. Liberiĝinte de niaj enuigaj malindaj disputoj pri tio, kiel ni povus altrudi niajn lingvon kaj kutimojn al aliaj ofte subpremataj popoloj, ni povus libere okupi nin per penado enkonduki en la vivo niajn idealojn el vero, bono kaj belo. Ĉu tio ne estas inda celo, al kiu ni povus entuziasme oferi nian vivon? Kompare kun tio, ĉu ne estas malpuraĵo la nun tiel adorata naciismo? Ne, ne unutonecon de l' vivo kaŭzos la forigo de la naciismo, sed ĝian pliriĉiĝon je spiritaj interesoj.

Vivu esperanto, komence kiel helplingvo, poste kiel mondlingvo!

Kaj kiel maljunulo Simeon, atendante la savon de l' mondo, ekvidinte infaneton Jesuo, povis morti konsolita, sciante, ke jam komenciĝis la savofero, tiel ni, kunvivantaj la infanajn



tagojn de esperanto, povas esti konsolitaj kaj certaj, ke homarfrateco jam efektiviĝas kaj baldaŭ fariĝos fakto. Haltigi fluon de l' tempo ni ne povas, plifaciligi kaj plirapidigi ĝin estas nia tasko. Progreso antaŭenpaŝas piedpremante tradicion; popolamaso nur nevole adiaŭdiras al tradicio, ĝi penas haltigi progreson. Ni ĉiuj volas konsideri nin kiel kulturajn, progresemajn homojn. Tial ne agu ni kiel popolamaso blinde sindona al tradicio, liberigu ni nin de tio, kies malutilon kaj nehaltigeblon ni ekkonis.

*For la naciismon, vivu la homaro!*